

1985 julio-aŭgusto
78a jaro
n-ro 955-956 (7-8)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando



Sofio: ĉu nova vojo por turismo?

Vi trovos

en ĉi tiu numero plurajn petojn por kunlaboro. Spite al naciaj, kulturaj kaj aliaj diferencoj, esperantistoj kunlaboras por atingi homajn celojn super tiuj diferencoj. Pri tio ni ĝuste fieras. Sed ĝis kioma grado ni fakte atingas tiun celon? Nin ĉiujn diversgrade limigas eksteraj faktoroj, sed ĉu niaj landaj kaj fakaj asocioj ne povus pli multe kunlabori – por eviti multoblighi la saman laboron aŭ fari ĝin pli profesie? Estos multaj eblecoj ekfunkciigi interlandan kaj interfakan agadojn en Aŭgsburgo.

Enhavo

- 121 Vilho Setälä 1892-1985
- 122 Alvoko al konferenco pri socilingvistiko kaj la internacilingva ideo
- 123 Interlingvistiko: La spertoj kaj signifo de Ahrenshoop (Detlev Blanke)
- 124 462 monumentoj, stratoj, placoj kaj peto por helpo
- 125 Ĝenerala direktoro de Unesko dankis Esperante (E. Chicot)
- 126 Turismo: La vojo post Manilo (Petâr Todorov)
- 126 Kongresoj: Fervojistoj en Danlando (Gernot Ritterspach)
- 127 Mark Starr 1894-1985
- 128 Lajos Kökény 1897-1985
- Lingvo: 13a Scienca Interlingvistika Simpozio (K. Schubert)
- 129 Reagoj: Nekomprenebla aplaŭdo (O. Haszpra); Por "hidrologio" (M. Persson); Mezepoka ekvacio (G. Pirlot); Pri arabdevenaj vortoj
- 131 Faka agado: Kion celas la verkistoj (Tibor Sekelj)
- 132 Recenzoj: *Učebnik jazyka esperanto* de Z.V. Semanova kaj M.I. Isaev (I. Maier); *Ombro sur interna pejzaĝo* de Spomenka Štimec (M. Haase); *Elprovado de l' amo* de Antun Šimunić (L.G. Nordenstorm); *Satana anĝelo* de G.R. Ledon (K. Long); *Ajn – senvortaĵoj kaj aliaj poemoj* de J. Hammarberg (M. Nervi); *Kio estas Esperanto/Que é o esperanto?* de Sylla Chaves (J. Calado); *Pensoj kaj protestoj* de Feiko Muniksma, *Facetoj* de Rejna de Jong (L.H. Knoedt)
- 135 Laste aperis... (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
- 137 TEJO-paĝo: Seminario por gvidantoj de TEJO en Pollando; Pri IJK 1987; Nova regularo de TEJO
- 138 Loke – Fake – Persone (mallongaj novaĵoj)
- 139 Nekrologoj
- 140 Oficiala informilo de la Centra Oficejo de UEA; Anoncetoj

La kovrilo

montras romian konstruaĵon en Sofio. Ni bildigas parton de la bulgara ĉefurbo, ĉar tie okazos la 6a Ĝenerala Asembleo de Monda Turisma Organizaĵo (MTO) kaj parto de seminario pri la lingvaj obstakloj al la turismo. Ĉi tiun organizas UEA, Bulgara Esperantista Asocio kaj Monda Turismo, prepare al la asembleo de MTO. Sed tio sufiĉos por plua pozitiva atento al Esperanto flanke de MTO, nur se la landaj Esperanto-organizaĵoj aktive kontaktos ĉiu sian delegacion. Pli sur paĝoj 125 kaj 126.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910). **Legata en 102 landoj.**

Voĉlegata por blinduloj.

Redaktoro: Geoffrey Sutton.

Abonprezo varias laŭlande (Gld. 44; US \$ 18; GM 39; enoj 3300 ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-supra adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1 400, 1/2 p. 740, 1/4 p. 400, 1/8 p. 240, 1/16 p. 150. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50 %. Eksterakviritaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Ned. poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso:
ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto (financo, administrado): s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; ☎ (050) 35 49 35.

Vicprezidanto (esploroj, rilatoj kun UN): d-ro Humphrey Tonkin, Office of the President, State University College, Potsdam, NY 13676, Usono; ☎ (315) 265 6744.

Vicprezidanto (informado): s-ro Umeda Yosimi, Aobadai 2-15-10, Meguro-ku, Tôkyô, 153 Japanio.

Ĝenerala sekretario: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII, 22. H-7624 Pécs, Hungario; ☎ (72) 23 274.

Estrarano (planado, Jubilea Jaro, landa agado): d-ro Renato Corsetti, Colle Rasto, I-00039 Zagarolo, Italio; ☎ (06) 95 25 713.

Estrarano (eksteraj rilatoj, junularo): d-rino Barbara Despiney, 35 rue Maurice Ténine, F-94260 Fresnes, Francio; ☎ (1) 237 14 73.

Estrarano (kongresoj): s-ro Roland Lindblom, Stenbockens gata 109, S-136 62 Handen, Svedio; ☎ (08) 777 41 75.

Estrarano (kulturo, edukado): s-ro Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, IS-108 Reykjavík, Islando; ☎ (91) 3 73 01.

Estrarano (faka agado, aplikado de Esperanto): inĝ. Petâr Todorov, ul. Veĵen 2, ap. 10, BG-1421 Sofia, Bulgario; ☎ 65 52 43.

Vilho Setälä 1892-1985

La 11an de aprilo, unu semajnon post la 93a datreveno de sia naskiĝtago mortis d-ro Vilho Setälä en Tampere, Finnlando. Sen ajna troigo finnaj esperantistoj povas diri, ke kun li forpasis tuta epoko. Lia nomo estis unu el tiuj malmultaj, kiuj estas konataj al preskaŭ ĉiuj esperantistoj tra la mondo.

Kiam Setälä lernis Esperanton en 1906, li samtempe instruis ĝin al aliaj junuloj. Li skribis: "Pro Esperanto mi, kiu finis la lernejon kun bonega atesto, ne kapablis koncentriĝi al regulaj studoj kaj uzis por meza universitata fineksamenado pli ol dek jarojn." Tuj post la Unua Mondmilito li verkis laŭteman lernolibron por finnlingvanoj *Esperanta legolibro* (1917) kaj la unuan vortaron inter la finna kaj internacia lingvoj. Jam en 1918 li fariĝis la redaktoro de *Esperanta Finnlando*, kaj plenumis tiun laboron ĝis 1973. En 1921 li fariĝis ano de la Lingva Komitato kaj poste membro de Akademio de Esperanto (de 1930).

Estas mirinde, kiom da verkoj – informiloj, vortaroj kaj lernolibroj de ĉiaj specoj – Vilho Setälä produktis, ofte mem eldonante. Jam en 1933 *Enciklopedio de Esperanto* notis, ke la totala eldonnombro de liaj finnaj lerniloj de Esperanto estas 56 200 ekzem-

pleroj. Lia produktiva laboro kiel pedagogo kaj vortaristo iusence kulminis en lia internacia lernolibro *Privilegia vojo al lingvoscio*, kies unua eldono aperis en 1958. Ĝi verŝajne estas la plej fama internacia memlerna libro de Esperanto. La kerna ideo de lia lingvo-instrua metodo estis proponi al la lernanto zorge ekvilibritan kvanton da lernenda materialo. En 1981 *Privilegia vojo* atingis jam sian kvinan eldonon, en entute 25 500 ekzempleroj. Laŭ la sama pedagogia metodo, aperis lia *Oportuna vortaro de ordinara Esperanto* en 1969. Sed Setälä estis ankaŭ tradukanto, instruisto, donacanto, gvidanto kaj mova forto de la Esperanto-movado en kaj ekster Finnlando.

Al la plej belaj faroj de Vilho Setälä apartenis liaj tradukoj de ŝatataj poemoj el la finna lingvo. Dank' al tio, la finna literaturo estas pli bone konata en Esperanto ol en aliaj lingvoj ekster Skandinavio kaj Hungario. Jam en 1919 aperis lia traduko *Batalo pri la domo Heikkilä* de Johannes Linnankoski (1869-1913). En 1946 aperis lia traduko *Spegulo homarana* de J.H. Erkko (1849-1906) kaj kvar jarojn poste lia fotokolekto *Burĝonoj*, kiu entenas tradukitajn poemojn. Multaj liaj pli mallongaj tradukoj, artikoloj kaj traktaĵoj aperis en lia vivrakonta kolekto *Fortoj de l' vivo* (1967). Vilho Setälä estis honora membro de la

Foto: T. Nousiainen



Vilho Setälä (maldekstre) ricevis en decembro 1979 specialan memormedalon de Esperanto-Asocio de Finnlando kiel rekonon de lia elstara kaj multjardeka laborado por la Internacia Lingvo.

Alvoko al konferenco pri socilingvistiko kaj la internacilingva ideo

Kiel grava ero en la antaŭprogramoj por la Centjara Jubileo de Esperanto, okazos de la 5a ĝis la 7a de aŭgusto 1986 Konferenco pri Socilingvistikaj Aspektoj de la Internacilingva Ideo. La konferencon organizas UEA, Japana Esperanto-Instituto kaj Nacia Muzeo de Etnologio en la japana urbo Suita, apud Ōsaka. Krome aŭspicias la konferencon Kultura Fondaĵo de Senri. Oni atendas ĉirkaŭ cent partoprenantojn por la tuta konferenco kaj kvarcent por la planata publika prelegkunveno.

La konferenco okazos laŭ la kolokva formo, kun prelegoj kaj traktaĵoj de dekelkaj lingvosciencistoj kaj aliaj fakuloj el diversaj landoj. La laborlingvoj estos Esperanto kaj la japana, kun samtempa interpretado por la publikaj prelegoj kaj laŭbezono en aliaj kunvenoj.

Pri la celo de la konferenco la organizantoj skribas, ke la Internacia Lingvo disvastiĝas kun la subteno de multaj erudiciuloj kaj lernantoj el plej diversaj socitavoloj. Tamen, la lingvo ankoraŭ ne estas juste rekonita kiel komuna lingvo, necesa kiel pli facila kaj sendiskriminacia esprimilo de homoj el diversaj etnaj grupoj. Aliflanke, la ideoj pri la bezono de neŭtrala internacie komuna lingvo ja leviĝadis, dum nur Esperanto plenumas tiun rolon en la nuna tempo. Kiuj faktoroj kontribuis al la nuna situacio?

Esperanto baldaŭ atingos sian centan jaron de vivado. Prilumante la historion, procezojn kaj gamon de la disvastiĝo surbaze de la socilingvistiko, la organizantoj celas esplori la internacilingvan ideon por pli bone kompreni la mekanismojn malantaŭ la fenomeno.

La kotizoj estas: a) 20 000 japanaj enoj (277 gld.) antaŭpagendaj por la tuta konferenco, inkluzive de ĉiuj dokumentoj kaj tagmanĝoj, b) 2 000 enoj (28 gld.) nur por la publika prelegkunveno, pagota je eniro. c) 8 000 enoj (111 gld.) antaŭpagendaj por la bankedo, okazonta tuj post la publika prelegkunveno, ĉ) diversaj prezoj por laŭkategoria loĝejo, mendebla pere de la konferenca sekretario. Ĉiu aliĝo kaj pago estu sendita al Konferenca Sekretariato ĉe Kultura Fondaĵo de Senri, Senri Banpaku Kōen 1-1, Suita-si, Ōsaka-hu, 565 Japanio. Tel. (06) 877-8893.


finna kultura asocio *Nuoren Vuoman Liitto* (Ligo de Juna Forto).

En 1955 Setälä fondis kaj ekdirektis Fondumon Esperanto, kiu celas akceli kulturajn rilatojn inter Finnlando kaj aliaj landoj per la Internacia Lingvo. Ĉe la fondo la organizaĵo ricevis kvin-ĉambran domon kun tereno de 0,26 hektaroj, kiun donacis lia edzino, Marke Setälä. Ĝi havas ankaŭ ampleksan bibliotekon kaj nun post la forpaso de Vilho Setälä Fondumo iras en la posedon de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Ekster la Esperanto-movado li redaktis *Kodin taitosanakirja* (Enciklopedio de hejmscienco), kiu entenas kompaktan kurson de Esperanto. La ĉefa okupo de Setälä estis la fotografio, pri kiu li verkis plurajn librojn. Ankaŭ sur tiu kampo li estis pioniro, kreinto de la finnlingva fota terminaro. Ankaŭ al la ĝenerala evoluo de la finnlingva fakvortaro Setälä multe kontribuis antaŭ duonjarcento kiel redakcia sekretario de *Tekniikan sanasto* (Teknika vortlisto). En 1972 la prestiĝa Suomalaisen Kirjallisuuden Seura (Societo por Finna Literaturo) publikigis lian studon *Suomen kielen dynamiikka* (La dinamiko de la finna lingvo). Ĝi kompreneble enhavas ampleksan resuman en

Esperanto. La postan jaron Universitato de Helsinko promociis lin honora doktoro pri filozofio.

Vilho Setälä estis siatempe prezidanto kaj poste honora prezidanto de Esperanto-Asocio de Finn-



Privilegia vojo, unu el la plej popularaj internacie uzeblaj kurslibroj de Esperanto.

lando. En 1979 la asocio komisiis al la konata finna skulptisto Heikki Varja formi bronzan medalon honore al li, kaj okaze de lia "90a printempo" la Finna Televido produktis filmon pri liaj vivoverkoj. Vilho Setälä estis Honora Membro de UEA.

La spertoj kaj signifo de Ahrenshoop

Fakgrupo Interlingvistiko/Esperantologio ĉe la Centra Estraro de Esperanto-Asocio en Kulturligo de Germana DR (GDREA) ekde 1979 ĉiujare okazigas nacilingvajn sciencajn seminariojn pri interlingvistiko. Tiuj seminarioj en GDR jam fariĝis konataj en lingvosciencistaj rondoj kaj ankaŭ eksterlande estas rigardataj kiel elmonro de stabila kaj kontinua interlingvistika agado.

Celo: La seminarioj en Ahrenshoop celas:

- informi lingvistojn kaj alidisciplinajn sciencistojn pri la interlingvistiko ĝenerale kaj pri Esperanto aparte, kun ĉiuj teoriaj aspektoj;
- stimuli neesperantistajn sciencistojn de GDR prilabori interlingvistikajn temojn;
- ebligi al elektitaj esperantistoj prezenton de interesaj kaj valoraj interlingvistikaj kaj esperantologiaj prelegoj kaj samtempe doni al ili eblecon kleriĝi en ĝenerale lingvistikaj temoj, traktataj abunde kaj interdiscipline dum la seminarioj;
- konatigi en lingvistikaj rondoj la interlingvistojn/esperantologojn de GDREA kaj akiri invitojn por prelegi en altlernejaj medioj;
- do kontribui al pozitiva ŝanĝo de la sinteno de lingvosciencistoj en GDR al la interlingvistiko/esperantologio kiel sciencaj disciplinoj kaj al Esperanto kiel lingvo – kun ĉiuj eblaj sekvoj.


Metodoj: La Fakgrupo serĉis kaj trovis sciencajn partnerojn, d-ran Georg Friedrich Meier, iaman profesoron por komunikada scienco ĉe Universitato Humboldt, Berlino. Tiel oni komune subskribis la invitleterojn, kio donis al ili pli altan prestiĝon. La leterpapero malhavis indikojn pri la Esperanto-asocio, por ne misprezentiĝi kiel esperantista varb-aranĝo.

Esperantistoj, krom elektitaj prelegantoj kapablaj kondukti en scienca medio, principe ne havas aliron al la seminarioj. Se tamen iuj volis aŭskulti prelegojn, oni donis permeson sub la kondiĉo, ke ili absolute ne partoprenu la diskutadon kaj konduku nealtrudeme kaj nevarbeme. Tiu rigora konduto flanke de la organizantoj estas nepre necesa. Unu varbsloga-nisma fuŝkontribuo en scienca medio detruas pli ol povas ripari dek sciencaj prelegoj pri la valoro de Esperanto. Oni invitas, laŭ kompleta listo de altlernejoj de GDR, ĉiujn enlandajn institutojn aŭ sekciojn por lingvoscienco kaj la lingvo-instruadajn sekciojn. Krome, invitoj iras al diversaj akademioj, centraj institutoj kaj aliaj institucioj kaj unuopaj sciencistoj.

Ne malgrava faktoro estas la bonegaj kondiĉoj (loĝado, seminariejo, manĝoj) en Ahrenshoop kaj la situo de la pitoreska loko ĉe la Balta Maro. Ne multaj sciencistoj volonte fuĝas por kelkaj tagoj el la streĉa profesia ĉirkaŭo, pretaj por ĝui la pitoreskecon de la loko kaj – ankaŭ – por informiĝi pri nova scio-kampo.

Ĉiu invitito ricevas kelkpaĝan tezon kun abundaj literaturindikoj. Eĉ nepartoprenanto tiel povas informiĝi pri bazaj interlingvistikaj problemoj kaj fakliteraturo.

La organizantoj ĉiam tiel aranĝis la prelegojn, ke neniel oni povas kritiki superregon de Esperanto. Ankaŭ oni konscie donis larĝajn eblecojn por skepti-



D-ro Detlev Blanke,
eminenta interlingvisto.

keco, demandoj, duboj. Nur tiel eblas konservi malferman sciencajn atmosferon.

Kadraj temoj de la seminarioj: Dum la unuaj du seminarioj (1979, 1980) oni prezentis diversajn interlingvistikajn temojn, sen aparte akcenti iun aspekton, sed la tria (1981) aparte konsideris la problemojn de la scienc-teknika informado kaj eblecojn apliki Esperanton. La kvara (1982) traktis pli sisteme la planlingvon kiel faklingvon. La kvina (1983) donis kontribuojn pri la kadra temo "Konfrontado planlingvo – etnolingvo", kaj la sesa (1984) denove estis pli ĝenerala. Sendepende de la unuopaj temaj komponantoj, ĉiam estis prezentitaj superrigardaj prelegoj pri interlingvistiko kaj esperantologio. Tio estis necesa, ĉar ĉirkaŭ 50% de la partoprenantoj ĉeestis la unuan fojon tian seminarion. Dum la lastaj tri seminarioj (1981-84) oni pro tio laboris parte en grupoj.

Partoprenantoj: La nombro de la partoprenantoj variis. 1: 1979 – 32, 2: 1980 – 24, 3: 1981 – 31, 4: 1982 – 39, 5: 1983 – 32, 6: 1984 – 26. La seminariojn partoprenis kvar ĝis ses membroj de la fakgrupo ĉe GDREA, do esperantistoj. Ili prelegis. Dum la ses seminarioj partoprenis entute 184 personoj, de ili 90 ĝis 100 diversaj profesiaj lingvistoj de altlernejoj de

GDR, t.e. katedraj profesoroj, docentoj, doktoroj, superaj kaj aliaj asistantoj, altlernejaj instruistoj k.a. Ili venis de ĉiuj ses universitatoj de GDR (Greifswald, Berlino, Jena, Halle, Leipzig, Rostock), unu teknika universitato (Dresden), ses pedagogiaj altlernejoj (Magdeburg, Zwickau, Köthen, Potsdam, Dresden, Güstrow), tri teknikaj altlernejoj (Ilmenau, Leipzig, Leuna-Merseburg), sep inĝenieraj altlernejoj (Berlino, Dresden, Wismar, Zittau, Zwickau: la rektoro 1980, Mittweida, Köthen), tri akademioj (ĝeneralscienca, pedagogia, minscienca), de du specialfakaj altlernejoj (por ekonomio en Berlino, por trafikproblemoj en Dresden), kaj de diversaj aliaj institucioj (centra instituto por bibliotekscienco, akademia eldonejo, universitataj bibliotekoj, komputil-uzino Robotron el Dresden k.a.).

Ĉefaj rezultoj: La seminarioj kreis ĉe la partoprenintoj sintenojn diversspecajn, sed ĝenerale pozitivajn.

462 monumentoj, stratoj, placoj kaj peto por helpo

En la aprila numero de *Esperanto* ni sciigis (p.78) pri la statistika esploro pri la stratoj, placoj kaj monumentoj, kiuj portas la nomojn "Esperanto" aŭ "Zamenhof", kiun kompilis Hugo Röllinger. Li poste informis, ke la intereso pri lia dokumento estas aparte vigla. Tuj post la publikigo li ricevis tutan aron da kompletigoj kaj korektoj. Laŭ tio la nombro de la statistikigitaj objektoj altiĝis al 462.

Röllinger skribis, ke restas ankoraŭ duboj pri kelkaj informoj. Ĉar estas grave havi plene ĝustan statistikon, li petas:

- 1) ke landaj, regionaj kaj lokaj organizaĵoj publikigu almenaŭ "sian" parton el lia dokumento, kun la peto, ke grupoj, delegitoj k.a. kontrolu ĝin kaj sciigu pri ĝustigoj aŭ mankoj. Bonvolu sendi po unu ekzempleron de la eldonaĵo al la kompilinto.
- 2) Tiuj samaj organizaĵoj kaj unuopuloj bonvolu ankaŭ en la estonteco informi la kompilinton pri ĉiuj nove starigitaj oficialaj objektoj.
- 3) Oni interesiĝu pri la eblecoj demandi la lokan aŭtoritaton oficiale nomi straton aŭ placon aŭ starigi monumenton, ekzemple okaze de la Centjara Jubileo de la Internacia Lingvo en 1987.

La dokumento estas havebla kontraŭ kvin internaciaj respondkuponoj de Hugo Röllinger, Theresienstr. 23, D-873 Bad Kissingen, FR Germanio; tel: 0971-3136.

vajn. Ili varias inter afereco ĝis plena scienca engaĝo. Oni pli bone komprenis la danĝeron facilanime kaj supraĵe juĝi pri temoj, kiuj estas ne bone konataj eĉ al specialistoj (de la Fakgrupo). Tiu sinteno, ligita al akiritaj scioj pri faktoj kaj problemoj, ĝenerale efikas pozitive por la informado de studentoj kaj kolegoj en la diversaj altlernejoj.

En diversaj revuoj aperis regule aŭ malregule informoj kaj raportoj pri la seminarioj. Ili helpis plifortigi la konscion pri tio, ke la seminarioj fariĝis aparta konstanta institucio kun originala profilo, unika kaj jam akceptata en la lingvistika pejzaĝo de GDR.

Diversaj prelegoj aperis presitaj kaj tiel plimultiĝis la scienca literaturo pri interlingvistiko. Valoras menciigi, ke ĉiuj prelegoj kaj la diskutoj estas registritaj sonbende. Tio koncernas 76 diverstemajn prelegojn kaj multegajn diskutkontribuojn. Ĉiu preleginto krome liveris germanlingvan resumon.

Multaj partoprenintoj prelegis pri la temoj kaj rezultoj de la unuopaj seminarioj en siaj altlernejoj (antaŭ kolegoj kaj studentoj). Ili efikis kiel multobligantoj de informoj kaj sintenoj.

Krome, laŭ invito de partoprenintaj lingvistoj, membroj de la Fakgrupo faris jare tri aŭ kvar prelegojn pri interlingvistiko (aparte pri la scienca valoro kaj aktuala apliko de Esperanto) en altlernejoj de GDR (ekz. foje antaŭ ducent lingvistoj en kleriga seminario en Leipzig, aŭ antaŭ doktoriĝantoj en Berlino).

Kelkaj partoprenintaj lingvistoj per sia persona engaĝo kaj reputacio kontribuis al tio, ke oni pretis projekti libron pri la planlingva problemaro en la akademia eldonejo kaj, ke oni serioze konsideras eventualan profesiigon de interlingvistikaj esploroj en GDR. Ili, neesperantistoj, verkis analizojn, recenzojn kaj ekspertizojn, kiuj helpis kaj helpas al la plua enradikiĝo de interlingvistikaj agadoj en GDR.

La profesinivela, kritika kaj ofte tre skeptika diskutado postulis de la partoprenantaj interlingvistoj/esperantologoj multon: precizan preparon de prelegoj, sciencnivelan reagon en diskutoj kaj ankaŭ la kuraĝon konfesi nescion pri iuj problemoj.

Profundiĝis la konscio ĉe la lingvistaro de GDR, ke ne iu ajn traktu pri interlingvistiko/esperantologio kaj pri Esperanto en konsultlibroj ktp.

Kvankam tio ne estis deklarita celo, la seminarioj helpis la fondon de Esperanto-grupoj en Teknika Altlernejo Ilmenau kaj Inĝeniera Altlernejo Zittau.

Krome, dum ĉiu seminario estis ekspoziciitaj 70 ĝis 100 fakaj libroj kaj gazetoj pri interlingvistiko/esperantologio en diversaj lingvoj.

Perspektive: Ĉi-jare okazos la sepa interlingvistika seminario en Ahrenshoop. Malfermaj problemoj nun diskutataj estas, ĉu trovi tute novajn partopre-

Ĝenerala direktoro de Unesko dankis Esperante

En la maja numero de Esperanto, ni informis, ke la 28an de marto la ĝenerala direktoro de Unesko, s-ro Amadou Mathar M'Bow, vizitis Atenon. Okaze de tio Helena Esperanto-Asocio bonvenigis lin per teleksa mesaĝo. Pri la sekvo raportis al ni Emmanuel Chicot, reprezentanto de UEA ĉe Unesko.

S-ino Maria Pontika, prezidanto de Helena Esperanto-Asocio, sendis al s-ro M'Bow mesaĝon en Esperanto, bonvenigante lin al Greklando kaj esprimante sian apogon al la agado de Unesko, ĉefe rilate internacian kompreniĝon kaj pacon.

Post sia reveno al la sidejo de Unesko, s-ro M'Bow per responda mesaĝo tre varme dankis Helenan Esperanto-Asocion. En ĝi li esprimis la grandan kontenton de Unesko pri la kontribuo de UEA, i.a. sur la kampo de internacia kompreniĝo kaj paco, kaj sian deziron daŭrigi tiun kunlaboron.

Tre notinde estas, ke tiu mesaĝo estis sendita de Unesko en Esperanto, dank' al traduko el la franca de esperantisto el Parizo. Tio kompreneble ne signifas, ke Unesko adoptis Esperanton, sed konfirmas la estimon de Unesko al UEA, al ĝia agado – interalie en Unesko –, kaj verŝajne subkomprenitan agnoskon de la valoro kaj taŭgeco de Esperanto kiel internacia lingvo.

Emmanuel Chicot

ntojn, (ekzemple studentojn kaj junajn sciencistojn), daŭrigi laŭ la bona provita vojo aŭ internaciigi. Ĉiu el tiuj proponoj havas por- kaj kontraŭ-argumentojn.

Bibliografiaj indikoj: Mi donas indikojn, se aperis la teksto de la prelego aŭ similspeca materialo de la aŭtoro, kiu kovras la temon:

Regule en *Fremdsprachenunterricht* kaj *Zeitschrift für Phonetik, Sprachwissenschaft und Kommunikationsforschung* (ZPSK), ambaŭ el Berlino.

TROEBES, O. (1980): Seminar über Interlinguistik. En: *Wissenschaftliche Zeitschrift der Universität Halle*, Gesellschaftswissenschaftliche Reihe, N-ro 2, p.127-128.

VÖLKEL, H. (1984): 6. Interlinguistik-Seminar. En: *Humboldt-Universität*, 29, 12/84.

BLANKE, D. (1980): Seminar über Interlinguistik vom 16-19. April 1979 in Ahrenshoop. En: *ZPSK*, 33, N-ro 4/1980, p.516-517.

RICHTER, U./PLOOG, S. (1982): 2. Wissenschaftliches Seminar zur Interlinguistik/Esperantologie. En: *ZPSK*, 35, N-ro 2/1982, p.245-247.

SÖRGEL, H. (1982): 3. Seminar über Interlinguistik vom 11-15. Oktober 1981 in Ahrenshoop. En: *ZPSK*, 35, N-ro 4/1982, p.491-492.

SÖRGEL, H. (1983): 4. Interlinguistik-Seminar in Ahrenshoop, 21.-25.11.1982. En: *ZPSK*, N-ro 1/1983, p.125-127.

SÖRGEL, H. (1984): 5. Seminar für Interlinguistik vom 30. Oktober bis 3. November 1983 in Ahrenshoop. En: *ZPSK*, 38, N-ro 5/84, p.643-644.

SPITZ, E. (1984): Das 5. Interlinguistik-Seminar 1983 in Ahrenshoop. En: *Der Esperantist*, 20, N-ro 125 (3/1984), p.49-51.

[Pri la 6a apero raportoj en *ZPSK*, vol. 39 (1985)].

La materialo de prelegoj grandparte troviĝas en: BLANKE, D. (1985): *Plansprachen in Theorie und Praxis*, Akademie-Verlag, Berlino.

BLANKE, D. (1983): Interlinguistik: Gegenstand, Probleme, Ergebnisse. En: *Sprachpflege*, Leipzig, 32, N-ro 2/1983, p.17-20.

BLANKE, D. (1982): *Esperanto und Wissenschaft*, Berlino (Kulturbund der DDR). Mendebla de Libroservo de UEA kontraŭ 12 gld. plus sendokostoj.

BLANKE, D. (1981): *Plansprache und Nationalsprache*. Linguistische Studien 85. Reihe A. Arbeitsberichte. Berlino (Akademie der Wissenschaften der DDR, Zentralinstitut für Sprachwissenschaft)

DAHLENBURG, T. (1983): Die internationale Plansprache Esperanto als Unterrichtsgegenstand. Entwicklung, pädagogischer Wert, Ergebnisse, Vorschläge. En: *Der Esperantist*, 19, N-ro 119 (3/1983), p.50-62, N-ro 120 (4/1983), p.74-84.

DIETZE, J. (1983a): Esperanto als Informationsrecherchesprache? En: *ZPSK*, 36, N-ro 6/1983, p.730-734.

DIETZE, J. (1983b): Die Wortbildung von Fachtermini im Esperanto. En: *ZPSK*, 36, N-ro 4/1983, p.450-454.

DIETZE, J. (1984): Die Wortwurzel in der Wortbildung des Esperanto. En: *ZPSK*, 37, N-ro 6/1984, p.711-715.

HÄUSLER, F. (1980): La sinteno de J. Baudouin de Courtenay al la problemo de mondaj helplingvoj. En: *Paco*, 1980, Berlino, p.32-33.

HÄUSLER, F. (1981): Baudouin de Courtenays Stellung zum Problem der Welthilfssprachen. En: *ZPSK*, 34, N-ro 3/1981, p.293-297.

HÄUSLER, F. (1981): Weltsprachen, Plansprachen und internationale sprachliche Kommunikation. En: *Wissenschaftliche Zeitschrift der Pädagogischen Hochschule "Erich Weinert"*, Magdeburg, 18, N-ro 2/1981, p.162-178.

HÄUSLER, F. (1982): Zur Problematik der Weltsprachen im 20. Jahrhundert. En: *ZPSK*, 35, N-ro 3/1982, p.267-277.

MEIER, G.F. (1980): Situation und Prognose der Sprachen der Erde. En: *ZPSK*, 33, N-ro 1/1980, p.63-74.

SCHÜLER, M. (1982): Esperanto und elektronische Datenverarbeitung. En: BLANKE 1982, p.67-73.

SÖRGEL, H. (1983): *Ein System der deutschen Verben im EDV-Bereich als Grundlage für die linguistische Datenverarbeitung mit einem Vergleich zu englischen und Esperanto-Verben*. Dissertation A, Humboldt-Universität Berlin.

SPITZ, E. (1982): Esperanto - eine agglutinierende Plansprache. En: *ZPSK*, 35, N-ro 5/1982, p.522-529.

STRING, P. (1979): Esperanto kiel objekto kaj instrumento de aŭtomata komputado. En: BLANKE, D. (1979, Red.): *La internacia lingvo: sciencaj aspektoj*. Berlino (Kulturlogo), p.220-224.

TROEBES, O. (1978): Gesellschaftliches Kommunikationsbedürfnis und Theorien von Welthilfssprachen. En: *ZPSK*, 31, N-ro 6/1978, p.595-599.

TROEBES, O. (1983): Welthilfssprache Esperanto. En: KARSDORF, G. (1983, Red.): *Veteranenkolleg der Martin-Luther-Universität Halle-Wittenberg*, vol.2, p.36-41.

(Detalajn raportojn pri la unuopaj seminarioj oni trovas en 1) *Der Esperantist*, n-ro 3/1979, p.18, 2) 1/1981 p.4-6, 3) 6/1981, p.137-138, 4) 6/1982, p.129-130, 5) 6/1983, p.137, 6) 6/1984.)

Detlev Blanke

TURISMO

La vojo post Manilo: necesas tuja kunlaboro

En la komitatkunsido de UEA en la 69a Unversala Kongreso en Vankuvero leviĝis kritikoj, ke la Estrara Raporto pri 1983 ne spegulas la rilaton inter turismo kaj Esperanto kaj la aplikon de la Internacia Lingvo en tiu sfero. Sed jam tiam la Estraro de UEA kaj la Komisiono pri Turismo planis okazigi simpo-

zion, kiu pritraktu la eblecojn de Esperanto solvi plurajn lingvajn problemojn en la internacia turismo.

Nun kontentige progresas la preparlaboroj por la internacia seminario pri "La lingvaj obstakloj al la libera evoluado de turismo", kiu okazos de la 11a ĝis la 16a de septembro 1985 en Internacia Esperanto-Kursejo en Pisanica kaj en Sofio (Bulgario). Ĝi preparos dokumentojn, kiujn oni oficiale transdonos al la 6a Ĝenerala Asembleo de Monda Turisma Organizaĵo (MTO), kiu eklaboros tuj poste en Sofio.

Ekzistas opinio, ke post la Manila Deklaracio de MTO, kiu favore menciis Esperanton, la dokumentoj de la simpozio devas krei kondiĉojn por nova, pli klara kaj logike pli engaĝa rezolucio de MTO pri la eblecoj de Esperanto.

La ĉefaj organizantoj de la simpozio estas UEA, Bulgara Esperantista Asocio kaj Monda Turismo, kiuj kunlaboras kun MTO. Oni starigis kontaktojn kun Gian Carlo Fighiera (Hispanio), altranga oficisto de MTO, Márton Lengyel, direktoro de Fremdultrafika Oficejo de Hungario, aliaj gravaj funkciuloj en la turismo kaj Bulgara Asocio por Turismo kaj Ripozo (BATO).

La gvidantoj de BATO, kiuj dommastros la Ĝeneralan Asembleon de MTO, ricevis informan leteron pri la simpozio. BATO siavice sciigis la ĝeneralan sekretarion de MTO pri la aranĝo, petante oficialan kunlaboron kaj rekomendon, ke funkciuloj de MTO sendu al la simpozio reprezentantojn el diversaj landoj.

La laborlingvoj de la simpozio estos la angla, franca, hispana, rusa kaj Esperanto. Oni jam ellaboris la bazan projektodokumenton, kiun ni baldaŭ dissendos al la landaj reprezentantoj de MTO. Interesitoj tiamaniere havos eblecon diskuti kaj informiĝi pri la traktotaj problemoj. Ankaŭ la landaj Esperanto-asocioj kaj unuopuloj, kiuj serioze agas sur la turisma kampo, ricevos la bazan projektodokumenton. Kiam vi detale trastudis ĝin, ni forte insistas, ke vi kontaktu en via lando la koncernajn aŭtoritatojn kaj klarigu la ideojn pri la eblecoj de Esperanto. Per tiu duflanka aliro ni klopodos certigi la sukceson de la simpozio kaj de la diskutoj en la koncerna komisiono en la Ĝenerala Asembleo de MTO. Ekzistas reala ebleco, ke la bulgara delegacio tie levos la demandon pri pli vasta uzado de Esperanto en la turismo. Tamen, por ke la afero sukcesu, ankoraŭ almenaŭ du-tri landaj delegacioj devas anticipe esprimi apogon al la propono. Tio estas atingebla nur se landaj Esperanto-organizaĵoj pretas starigi seriozajn kontaktojn kun anoj de la sialanda delegacio. La Esperanta organizaĵo Monda Turismo jam faris la unuan paŝon, sendante al MTO oficialan proponon pri diskutindaj temoj por ĝia Ĝenerala Asembleo.

La menciitaj unuaj konkretaj agoj mobilizu nin, por ke ni konkrete kaj insiste laboru por atingi pli

grandajn sukcesojn en la sfero de la turismo, kie oni forte sentas la lingvajn barojn. Sukceso en Sofio estus grava atingo por la celebrado de la Centjara Jubileo de Esperanto.

Petâr Todorov,
Estrarano pri Faka Agado

KONGRESOJ

Fervojistoj en Danlando

Pasintjare Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEFF) akceptis inviton el Danlando, Finnlando, Norvegio kaj Svedio al "nordia kongreso". Kiel kongreslokon oni elektis Vejle en suda Danlando, kaj pli ol 300 fervojistoj kun familianoj el 19 landoj venis tien por kongresi de la 16a ĝis la 23a de majo.

La malfermon de la kongreso agrabligis uniformita blovorkestro. Uzante Esperanton, salutis la urbestro de Vejle, la vicĝeneraldirektoro de Danaj Ŝtatfervojoj (DSB) E. Rolsted Jensen, la vicprezidanto de FISAIC (Internacia Federacio de Kulturflagentaj Fervojistoj), Barbro Erikson (Svedio), reprezentantoj de la dana FISAIC-sekcio DJIF, de UEA, de Sennacieca Asocio Tutmonda kaj de 17 diversaj landoj. En sia propra lingvo, kun interpreto, salutis la protektanto de la IFEFF-kongreso en 1987, la pola vicministro por trafiko kaj regiona ĉefo de la fervoja distrikto Krakovo, inĝ. Aleksander Rodak. La prezidanto de IFEFF, Joachim Giessner, en sia malferma parolado atentigis precipe pri la Centjara Jubileo de Esperanto, en kiu nia Federacio aktive partoprenu.

La unuan kaj lastan tagojn de la kongreso kunsidis la Terminara Komisiono de IFEFF. Rezulte de elekta ĝia prezidanto nun estas Gernot Ritterspach (FR Germanio), sekretario inĝ. L. Sekereš (Jugoslavio) kaj la redaktoro de *Terminara kuriero* restas Dieter Hartig (FR Germanio). Kontentige progresas la traduka laboro pri fervojfaka leksikono kun pli ol dek mil terminaroj. Paralele kun la fina reviziado de IFEFF, la eldononto UIC (Internacia Fervoja Unio) preparas novan, kvaran eldonon de la verko kun esence ŝanĝota enhavo, kaj ni sekvos tiun procedon. Por eldoni Esperantan aldonon al tiu seslingva UIC-leksikono, IFEFF nun komencas ŝpari monon el sia buĝeto kaj petis donacojn. Sumoj jam estas asignitaj.

La faka ĉefprelego, verkita de Gunnar Thuesen, titoliĝis "Eksterordinaraj transportoj – planado helpe de komputero". Al tiu interesa prelego pri la preparoj necesaj por ebligi surrelan transportadon de tre pezaj aŭ tre grandvolumaj ŝarĝoj, li aldonis serion da memfaritaj lumbildoi.

"Nordiaj fakaj novaĵoj" estis la titolo de kunveno, kiu donis eblecon sin fake prezenti Svedio, Norvegio kaj Finnlando. Kombinante sonbendon kun lumbildoj, ges-roj Bengtsson rakontis pri sveda enlanda fervojlinio, kies ekzisto estis en danĝero pro malprofito. Laŭ iniciato de ĵurnalistino oni ekorganizis grupvojaĝon por montri la turismajn naturbelecojn de la regiono, rezulte de kio la trafiko denove floris, sed ĉu daŭre? Pri la batalo kontraŭ neĝ-amasoj ĝis 18 metrojn altaj prelegis Per Engen el Norvegio. Necesas kaj fortegaj maŝinoj kaj firmaj konstruaĵoj por tutjare certigi fervojan trafikon tra montara regiono, ekzemple de Oslo al Bergen. Fine mag. Nils Gösta Narvala el Finnlando montris lumbildojn pri la plej modernaj pasaĝervagonoj de sia lando: unu speco ofertas ĉian komforton por tagnoktaj grupvojaĝoj, dum alia por konferencoj sur reloj estas ekipita per ĉiaj teknikaĵoj por kolortelevido, vidbendoj, stereo-fono, telefonado kaj manĝoregalado.

Fervojaj aktualaĵoj el ok landoj konsistigis alian posttagmezan programeron. La koncizaj kontribuoj, parte ilustritaj per lumbildoj, vekis viglan intereson de la kongresanoj. Krome, dum la kongreso estis havebla la interŝtata *Konvencio pri la internacia fervoja trafiko* (COTIF, valida ekde la 1-a de majo ĉi-jare), kies Esperanta traduko de mag. Gvozden Sredić aperis en *Jugoslavia fervojisto* (n-ro 1-2/1985). Interesitoj povas turni sin al Jugoslavia Asocio de Fervojistaj Esperantistoj, Pf. 563, YU-11001 Beograd, Jugoslavio.

Dimanĉmatenon okazis kleriga prelegserio. Jan Sośniecki (Danlando) science pritraktis la demandon, kiun rolon ludas la fikcio en Esperantaj romanoj, komparante la verkon *La litomiŝla tombejo* de Piĉ kun la "Ĉu-romanoj" de Valano. Gvozden Sredić prezentis eseon pri la fervojo kaj junularo, pastro Hans Amund Rosbach (Norvegio) prelegis pri la junularo kaj religio. Poste Per Johan Korgstie (Nor-

vegio) prezentis interesajn bildojn pri la evoluo de fervojistaj uniformoj en la nordiaj landoj. D-ro Werner Bormann (FR Germanio) skizis la taskojn kaj labormanieron de Akademio de Esperanto. Dum alia kunveno Poul Thorsen kaj Kaj Røssum el Danlando

Foto: Karen Olsen



Preben Bagger, komitatano, salutis la 37an kongreson de IFEF nome de UEA.

prezentis la diversajn evolu-etapojn de Esperanto-kanzonoj.

Je alia okazo oni montris filmojn pri pasintaj kongresoj kaj pri la venontjara kongresurbo Skopje en Jugoslavio. Gazetara konferenco, oficiala akcepto fare de la urbestro, ekumena diservo kaj koncerto en urba preĝejo certigis kaj publikan prezentigon kaj edifon por la partoprenantoj. Radioamatora elsendotacio (OZ 3 DSB) funkciis ĉiutage escepte de mardo, vigle kontaktante kun multaj landoj. Okazis ankaŭ kongresa balo, nordia distra vespero, kabareda vespero kaj ampleksa turisma programo kun ekskursoj. Dankon, gratulon kaj altan estimon al la Loka Kongresa Komitato pro la glata disvolviĝo, inkluzive de kvarfoja aperigo de kongresa bulteno.

Gernot Ritterspach


Mark Starr 1894-1985

La 24an de aprilo forpasis Mark Starr. Li komencis sian karieron kiel edukisto de laboristoj en 1920, kiel instruisto de ekonomiko kaj socia historio por Federacio de Sudkimraj Ministoj. En 1928 li elmigris al Usono. En 1935 Starr fariĝis Eduka Direktoro de Internacia Unio de Laboristoj pri Virinaj Vestaĵoj, granda usona sindikato. Li restis en tiu posteno ĝis 1960, kiam li fariĝis komisiito de Internacia Labora Oficejo unue en Singapuro kaj poste en orienta Afriko. Jam en 1945 li estis delegito de Usono en la Ĝenerala Konferenco de Unesko en Londono, kaj

estro de la usona delegacio en Konferenco de Unesko pri Plenkreskula Edukado en 1949, en Danlando. De Usona Federacio de Instruistoj li estis vicprezidanto de 1940 ĝis 1942.

La Esperanto-kariero de Mark Starr komenciĝis en brita malliberejo dum la Unua Mondmilito, kie li kiel militrifuzanto lernis la Internacian Lingvon je instigo de sia fratino Ellen Gregory, alinome konata kiel Nenjo Rimanto. Dum multaj jaroj li estis aktivo en Sennacieca Asocio Tutmonda kaj estis regula kontribuanto al *Sennaciulo*. Li fariĝis bone konata gvidanto de Esperanto-kursoj kaj prizorgis Esperanto-fakon en la ĉefa laborista ĵurnalo brita, *Daily*

Herald. Li estis vicprezidanto de Esperanto-Ligo por Nord-Ameriko (ELNA) de 1965 ĝis 1972 kaj direktoro de Esperanta Inform-Centro en Novjorko dum la sama periodo. Li poste estis la ĉefa represen-



De maldekstre: Lajos Kökény kaj Mark Starr.

tanto de UEA ĉe Unuiĝintaj Nacioj kaj de ELNA ĉe la usona misio al UN. En 1966 li estis inter tiuj, kiuj prezentis al la Sekretariato la Proponon al UN okaze de la Jaro de Internacia Kunlaboro.

Inter liaj multaj libroj kaj pamfletoj aparte menciindaj estas *Lies and Hate in Education* (Mensojoj kaj malamo en edukado, 1928), kiu pritraktis antaŭjuĝojn en lernolibroj de diversaj landoj kaj kies materialon li havigis per esperantistaj kontaktoj, kaj *The American Labor Movement* (La usona laborista movado, 1972). En 1974 li eldonigis Esperantan tradukon de la Dua Humanista Manifesto, inter kies eminentaj subskribintoj li mem troviĝis. Li multe verkis nacilingve pri la Esperanto-movado.

Li estis unu el la pioniroj de la laborista Esperanto-movado, sed samtempe li kontribuis vaste kaj profunde al la neŭtrala movado, i.a. kiel organizanto senlaca, kiel talenta instruisto kaj teoriisto. Li estis dumviva membro de UEA. En Usono li ne nur vartis la nacian movadon sed ankaŭ unuigis ĝin, kaj en UEA li ofte ludis la rolon de harmoniiganto. En 1975 la komitato de UEA nomis lin Honora Membro.

Lajos Kökény 1897-1985

La 27an de aprilo mortis Lajos Kökény. Li ekler- nis Esperanton en 1919 en Budapeŝto. En Miskolc li komencis instrui la lingvon. Li en 1924 fariĝis parlamenta stenografo en Budapeŝto, kiun postenon li tenis ĝis 1950. Li verkis plurajn popularajn lernolibrojn pri stenografio kaj ortografio kaj klopodis uti- ligi Esperanton ankaŭ en tiu fako. La Radnai-steno- grafion li adaptis por la Internacia Lingvo.

En 1928 li fondis la gazeton *Hungara heroldo*, ofi- ciala organo de la tiama Hungara Esperanto-Societo (HES), kaj redaktis ĝin dum kvin jaroj. La gazeto multe helpis al la movado, ĉar pluraj eminentuloj de la tiama hungara kultura vivo aperigis en ĝi artikolojn, kio – ĉefe en la intelektula medio – popularigis

Esperanton. Same valora kontribuo estis la tri volu- moj de *Magyar eszperantó évkönyv* (Hungara Esperanto-jarlibro, 1931-33). Li verkis artikolojn pri Esperanto por kvin hungaraj enciklopedioj, aranĝis literaturajn vesperojn, verkis multegajn artikolojn kaj eldonis lernolibrojn. Tamen lia plej granda atingo verŝajne estas lia kontribuo al la 600-paĝa *Enciklopedio de Esperanto* (1933-34), kiun li kunredaktis.

En 1932 laŭ lia iniciato fondiĝis ekzamena komi- tato de HES. Dum dek jaroj li estis vicprezidanto, poste prezidanto de HES. Post la unuiĝo de HES kaj Hungara Esperanto-Societo Laborista en 1946, li estis kunprezidanto. Li tiutempe varbis simpatiantojn de Esperanto inter la parlamentanoj kaj atingis, ke en enketo pri la lerneja instruado de la Internacia Lingvo 102 el ili favore respondis.

Por lia lernolibro *Populara lernolibro de Esperanto* (1947), la gramatikan parton verkis d-ro Kálmán Kalocsay. Dum la 60-aj jaroj li verkis 500-paĝan Ma- torion pri la oka kvartalo de Budapeŝto. Dum la ok jaroj de 1961 ĝis 1968 li estis ĉefredaktoro de *Hungara vivo*, poste redaktoro de la monata asocia organo *Hungara esperantisto*. Post tio, jam pli ol 80-jara, li restis aktiva kunlaboranto de *Hungara vivo* kaj *Buda- peŝta informilo*. En 1980 la komitato de UEA elektis Lajos Kökény Honora Membro.

LINGVO

13a Scienca Interlingvistika Simpozio

Ni delonge timas la tagon, kiam iu registaro su- decides enkonduki Esperanton devige en ĉiuj lerne- joj de sia lando. Ni ne estas pretaj por tiu tago. Sed ni ĉiuj ja certas, ke tiu tago ne venos. Jam estas survojaj tamen la tagoj, kiam eble ne registaroj, sed iuj ekster- movadaj instancoj interesiĝos eble ne pri tuja enkon- duko, sed ja pri ia serioza konsidero de Esperanto. Sed antaŭ ol serioze konsideri Esperanton (kaj konsi- deri Esperanton serioza), oni petos la juĝon de faku- loj. Kaj fakuloj pri lingvo ja estas la lingvistoj. Ni tamen ne facilanime certu, ke kiu ajn lingvisto pozi- tive juĝos Esperanton, kaj ni ne igos ilin juĝi pozitive per tio, ke ni pledu kaj plendu ĉe ili. Por ke la lingv- istoj serioze traktu Esperanton, ni devas mem serioze trakti la lingvistikon.

Ĉi tial estas kuraĝiga kaj daŭrigenda la serio de interlingvistikaj simpozioj, kiun la esperantistoj en Asocio de Polaj Studentoj okazigas en Varsovio ĉiu- aprile. Ĝus finiĝis la 13a.


Dum tri densprogramaj labortagoj (plus alvena kaj finkunsida duontagoj) kvindeko da esplorantoj,

Fotoj: Brian Moon



Partoprenantoj aŭskultas prelegon de d-ro Balázs Vácha el Budapeŝto.

studantoj kaj ŝatantoj de lingvoj diskutis pri dudek-kvino da prelegoj. La sintakso de Esperanto altiris plej multajn prelegantojn. Ĝin oni priskribis ĝenergramatike, komparis al la sintakso de lingvoj en la hinda lingva areo kaj al la vortordo de la jida. Oni debatis pri la influo de la hungara al la uzo de la artikolo en Esperanto, pri la gramatika karaktero de la radikoj kaj ties sekvoj por la signifrilatoj inter samradikaj derivaĵoj kaj pri la asertita ekzisto de gramatika genro en Esperanto. Lige al la nederlanda projekto, uzanta Esperanton kiel esencan funkciilon en komputila tradukado, oni prelegis kaj pri tiu projekto mem kaj pri la pli-ol-homa ekzakteco kaj malambigueco kiun tia lingvoprilaboro premisas, sed kiun Esperanto kiel homa lingvo malhavas preskaŭ samgrade kiel etnaj lingvoj. Tiuj tri prelegoj jam kondukis al semantiko. Pri vortfarado oni aŭdis pli, nome pri la klopodoj krei fakterminojn en Esperanto kaj roliĝi Esperanton en la etnolingva terminografia medio, kaj viglan debaton kaŭzis ankaŭ du pledoj, unu kontraŭ la eŭropa naturalismo kaj por aŭtonome Esperanta



D-ro Klaus Schubert prelegas.

afiksa vortfarado, la alia kontraŭ la komplika sistemo de landnomaj afiksoj, proponita de Cool kaj Eichholz.

Sed ne nur Esperanto estis la temo de la simpozio. Okazis du prelegoj pri tradiciaj kaj pri komputilaj informtraktaj sistemoj, kies problemojn povus solvi Esperanto, sed kiuj tamen estas ĝenerale interesaj. Ankaŭ la malebleco de altkvalita tutaŭtomata tradukado koncernas ne nur nian lingvon. Ĝenerale interlingvistikaj estis tri prelegoj pri pazigrafio, pri la motivoj, instigintaj homojn koncepti planlingvojn kaj pri la termina distingo inter ĉiaj planlingvoj, interlingvoj, helplingvoj ktp. Pri Esperanto, sed ne pri lingvistiko temis pensokirla prelego pri la esperantista socio, kondukanta ne kiel movado. Iom eksterteme staris cerbumadoj pri la franca kaj la bulgara, kiuj, elektinte la temon normo, tamen sengrince ligiĝis al la aliaj diskutoj.

Oni levis la nivelon de la Sciencaj Interlingvistikaj Simpozioj (SIS) kaj sukcesis altiri pli profesinivelajn prelegantojn. Per tio la vojaĝo valoras laŭ elspezon ankaŭ por ĉiam pli foraj partoprenantoj. Tamen oni ne leviĝis super la kapojn de la studentoj. Oni ne forlasis tiun esperantistan etoson, kie kiu ajn sentas sin kompetenta paroli pri lingvo. Tio estas salutinda kaj konservinda eco, kiu havigas rektan kontakton inter la uzantoj kaj la esplorantoj de Esperanto. Ambaŭ flankoj profitas de tiu kontakto.

Ekde la 11a SIS en 1983 oni eldonas la prelegojn en simpozia volumo. La dua volumo de 1984 survojas. Per tiu publika elpaŝo SIS fariĝos pli konata en nia movado kaj estus dezirinde, ke tio konduku al pli vasta kaj pli diversdevena diskutforumo en venontaj jaroj. Jam nun la laŭlanda deveno estis agrable miksitaj, sed senteble mankis vojaĝeblecoj por multaj, kies kontribuojn ni volonte aŭdus, ekzemple el Sovetunio kaj el Rumanujo.

Klaus Schubert

Scienca interlingvistika simpozio, red. Ryszard Rokicki. Varsovio: Akademickie Centrum Interlingwistyczne, 1984. 160p. 21cm. Acta Interlinguistica. Prezo: 18,00gld.

REAGOOJ

Nekomprenebla aplaŭdo

En la decembra numero de *Esperanto* aperis recenzo kun la titolo "Lingvosciencistoj pri mondlingvaj problemoj" pri la hungarlingva libro "A világnyelv" (La mondlingvo). La recenzo aperis sen subskribo, kaj tio ŝajnigas ĝin aŭtoritata opinio de la redakcio (eĉ se menciite, ke ĝi baziĝas sur la recenzo de V. Benczik, aperinta en *Hungara vivo*). La spirito

de la tuta recenzo estas unuanima aplaŭdo. Kontraŭ tio mi devas protesti!

Fakte la enhavo de la libro absolute ne estas ĝisdata, nek sciencnivela, kaj ĝia tuta spirito estas malobjektiva kaj kontraŭ Esperanto, eĉ se la aŭtoro kaj eldonejo volas sin ŝajnigi senpartiaj. Estas bedaŭrinde, ke la eksteran reputacion de la libro la eldonejo povis altigi per la nomoj de la reviziantoj, du bone konataj esperantistoj, sed evidente nek la eldonejo, nek la aŭtoro konsideris ilian opinion por pliĝustigi la tekston.

La malaktualecon kaj nesciencecon de la libro jam montras la citita literaturo mem; se ni konsideras la unuajn aperojn, duono de la literaturo aperis antaŭ 1950 kaj la plej freŝa en 1976. Ĉiuj scias, ke ĝuste dum la lasta jardeko tre grava evoluo okazis kaj okazas pri la lingvo kaj movado de Esperanto ĝenerale kaj pri ties scienca kaj faka aplikado precipe.

Ni devas diri, ke la citaĵoj en la libro praktike estas arkaikiĝintaj, spekulaciaj, naivaj, eĉ se diris ilin reputaciaj lingvistoj (tamen laikoj en la interlingvistika tereno).

La neobjektiva prezentmaniero troviĝas en la elektado de la citaĵoj. La lasta, do plej efika, kuraĝas egalrangigi Esperanton kaj Interlinguan, kvankam pri Interlingua ĝi povas citi nur el 1953, kiam fakte nur ties mortado komenciĝis.

La neobjektiveco speguliĝas ekz. en tio, ke la leganto ricevas multajn gramatikajn detalojn pri la kreola lingvo de la insulo Maŭricio aŭ pri la interesa, sed absolute ne vivkapabla artefarita lingvo Solresol, sed pri la Esperanta gramatiko nek la citaĵoj, nek la aŭtoro diras eĉ unu vorton. Samtempe en la citaĵoj la Esperantaj vortoj estas kriplaforme prezentitaj, sen atentigo pri la ĝusta skribmaniero (*chiuj*, *csia*, *amus* anstataŭ "ĉiuj", "ĉia", "amus" ktp.). La leganto ekhavas la opinion, ke eĉ la ortografio de Esperanto estas ia konfuzaĵo.

La aŭtoro estas kontraŭ ĉiuspeca internacia lingvo. Tiun sian opinion li klopodas altrudi al la leganto prezentante la malsukcesintajn lingvoprojektojn kiel lingvistike bonajn (pri la efektiva nombro de la parolantoj li silentas) kaj Esperanton kiel diletantaĵon ja lertan (ni vidas per animaj okuloj kiel la aŭtoro afable frapetadas la ŝultron de tiu laikulo Zamenhof), sed lingvistike fuŝan, do disvastiĝintan nur pro nesciencaj kaŭzoj.

"Strange, sed laŭ mia scio ĝis nun neniu rimarkis, ke la nekredeblan esprimpovon kaj vivkapablon de la naturaj lingvoj simple per scienco oni ne povas rekrei. Esperanto ne estas nur science, metie, sed ankaŭ arte (belarte) 'farita'. Tial ĝi superas ĉiujn aliajn lingvoprojektojn".

Fine la leganto povas konkludi, ke okupiĝi pri internaciaj lingvoj ne meritas la tempon, ĉar se ili estas lingvistike bonaj, ili ne povas disvastiĝi, dum se

ili fakte iom disvastiĝas, ili ne estas indaj por disvastiĝo. Do ni faru nenion, precipe ni ne vidu la novajn faktojn.

La esenco de la libro estas ne en la enhavo de la opaj citaĵoj, sed parte en la efiko de ilia kompleta tuto kaj parte en la ŝajne objektivaj, sed esence subfoskarakteraj komentarioj de la aŭtoro-redaktinto.

Kial rekomendi tiun "verkon" por traduko alilingven, restas por mi mistero.

Se ni povas tamen fari ian favoran konkludon, jen: Kiam tiaspecaj eldonaĵoj kaj ilin rekomendantaj „esperantistaj” recenzoj aperas kaj tamen Esperanto restas viva, tio pruvas ĝian superecon kompare kun iu ajn alia solvo. Do estas nepre inda kaj progresiva afero labori por ĝia evoluigo kaj akcepto.

Ottó Haszpra (Hungario)

Por "hidrologio"

Kun ĝojo mi legis en la tria numero de 1985 la artikolon pri la aktivado de la klubo en Norrköping, Svedio. Nur pri unu afero mi iomete miris. En la teksto pri la kovrila bildo mi legis, ke oni fotis ekster "Sveda Meteologia kaj Hidraŭlika Instituto". Laŭ mia opinio "hidrologia" estus pli bona ol "hidraŭlika". Pravas, ke la vorto "hidrologio" ne troviĝas en *Plena ilustrita vortaro*, sed hidrologio kaj hidraŭliko estas malsamaj sciencoj kaj aliaj lingvoj havas du vortojn. Tial oni ankaŭ en Esperanto devus uzi la vorton "hidrologio".

Magnus Persson, hidrologo (Svedio)

Mezepoka ekvacio

La letero de s-ro Jeremi Henrikson (*Esperanto*, p. 44/1985) instigis min eniri la diskuton por rimarkigi, ke estas false kredi, ke lingvo egalas al kulturo.

Laŭ mi, la ekvacio "lingvo = kulturo" estas mezepoka. Fakte lingvo estas nur komunikilo, sed ĝi ne estas la komuniko, sekve, ĝi ne povas esti "kulturo".

Sufiĉas konstati, ke nuntempe, pro la kreskantaj komunikoj internaciaj, interkontinentaj, pli kaj pli samlingvanoj ne estas samkulturanoj. Kulturo dependas de pluraj faktoroj; ĝi ofte malsamas de urbo al vilaĝo, eĉ de unu profesio al alia, de unu familiano al alia. Oni povas aserti, ke kulturo fariĝis persona kaj ke "homo = kulturo".

Anstataŭ perdi tempon per vanaj, senfinaj diskutoj pri la lingvo, pri ĝia ŝajna esenco, estus preferinde uzi ĝin. Malmultaj esperantistoj deziras kaj/aŭ kapablas uzi Esperanton utile, t.e. por fakaj, profesiaj celoj. La plimulto kapablas do per ĝi nur turismi, klubi, kongresi "inter ni"!

Ĉu la Esperanto-movado daŭrigu kiel nun, zorgante ĉefe pri (super)idealistoj kaj forigante la mal-

revulojn, por pluvi veti dum jarcentoj, aŭ ĉu ĝi instigu paralele ankaŭ utilan uzadon de la lingvo por fakaj, profesiaj celoj, por ke Esperanto fariĝu pli alloga en plej diversaj medioj (kun aŭ sen "interna ideo").

Germain Pirlot (Belgio)

Pri arab-devenaj vortoj

La aperigo de 92 vortoj en la januara numero de *Esperanto* (p.9), kiujn Badiollah Samimy el Irano kredis esti arabdevenaj, vekis ne malmulte da intereso, kiel la redaktoro supozis.

Spiros Sarafian el Greklando skribis: "... mi sciigas, ke [la vorto 'narciso'] devenas de la greka. ... temas pri la nomo de la konata planto, sankta floro de la dioj de Hadeso kaj simbolo de velkado kaj morto, kiu donis sian nomon al la konata memadorantoheroo de la greka mitologio (vd. en *Plena ilustrita vortaro*, p.726).

En la sama listo estas ankaŭ la vorto 'paradizo', pri kiu estas dubo, ĉu ĝi devenas de la greka aŭ de la ĥaldea. ... la antikva greka historiisto Ksenofono ofte uzas la vorton, kiu laŭ kelkaj sciencistaj opinioj devenas de la kunmeto de la greka prepozicio *para* 'ĉe' kaj la verbo *devo* 'akvumi'."

André Cherpillod (Francio) kompilis sian propran "liston de preskaŭ 150 vortoj arab-devenaj (kvankam kelkaj povas tamen esti iran-devenaj, neniam estas facile diferencigi)." Nils Utne (Norvegio) kaj Bernard Golden (Hungario) sendis respektive ampleksan studon kaj artikolon. Ankaŭ Sergio Docal (Usono) diris, ke la listo certe ne estas kompleta.

Golden skribis: "Superrigardo de la listo montras, ke tre malmultaj venis rekte de la araba; ... Eĉ sen granda vortaro ĉemane, estas eble trovi plurajn mankojn. La listo, do, ne estas serioza kontribuaĵo al la

multaj arabdevenaj stelaj nomoj, kiel Aldebarano, Algolo ktp.): Astronomio kaj matematiko: *almanako*, *azimuto*; Konstruado: *alkazabo*, *azuleño*, *alkovo*; Botaniko: *alfo*; Politiko: *alkado*; Ujo: *alkarazo*.

Nils Utne kaj André Cherpillod konsentas pri la araba deveno de aldonaj vortoj: *alkazaro*, *cifero*, *ĉifro*, *eliksiro*, *ĝirafo*, *heĝiro*, *kalabaso*, *karobo*, *lazuro*, *magazeno*, *makabra*, *marabuto*, *masko*, *maskerado*, *matraco*, *muslino*, *musono*, *nadiro*, *oranĝo*, *realgaro*, *sahibo*, *sunao* kaj *zenito*. Golden kaj Utne aldonas i.a. *Alaho*, dum Utne kaj Cherpillod *Korano*.

Cherpillod kaj Golden konsentas pri la araba deveno de la vortoj: *adobo*, *alidado*, *alkazaro*, *almeo*, *anilo*, *aroki*, *artiŝoko*, *averaĝo* kaj *averio*.

FAKA AGADO

Kion celas la verkistoj

En la 68a Universala Kongreso en Budapeŝto, oni fondis Esperantlingvan Verkistan Asocion (EVA). Per tio, fine, grava sektoro de la portantoj de la kulturo de Esperanto ricevis sian fakan organizaĵon, kies manko sentiĝis dum longa tempo.

EVA ekestis laŭ konsento de 68 kunfondaj membroj el 28 landoj. Tri membroj forpasis de tiam: Rajna Konstantinova, Clelia Conterno kaj Ivo Rotkvić, sed pluraj novaj estas akceptitaj, tiel ke ĝi nun konsistas el 80 membroj.

Antaŭ ĉio estis necese elekti la komitaton, la gvidantojn kaj membrojn de unuopaj projektoj – ĉion per korespondado. La komitato de EVA konsistas el Tibor Sekelj, prezidanto, Baldur Ragnarsson, vicprezidanto, Ada Csiszár, sekretariino, Charles Power, kasisto, kaj s-ino Marjorie Boulton, Aldo de' Giorgi, Bernard Golden kaj Miyamoto Masao.

Laŭ la statuto de EVA ĝiaj membroj povas esti: a) verkistoj de beletro (prozo, poezio, teatraĵoj, eseoj) aŭ de faka literaturo (scienco, tekniko); b) tradukantoj al Esperanto en la branĉoj menciitaj; c) kritikistoj/recenzantoj de tiaj verkoj; ĉ) redaktoroj de prestiĝaj internaciaj Esperantaj gazetoj kaj d) eldonantoj de Esperantaj eldonaĵoj. Por fariĝi membro de EVA kandidato devas esti proponita de tri anoj kun detala motivigo. La sekretario voĉdonigas la proponon, kaj la komitato per simpla plimulto akceptas aŭ malakceptas la kandidaton.

La juna asocio de verkistoj adoptis plurajn projektojn por la baldaŭa estonteco:

1) *Klasikaĵoj de Esperanto*. Laŭ ĉi tiu projekto komisiono elektos verkojn de iu ajn ĝenro, kiujn ĝi konsideras la plej valoraj produktoj originale verkitaj en la

طائرة
مطار
الغد، باكرة
ماء، مية
اهلا وسهلا
طبيب، بخير
امني؟
فين؟
نعم، ايوة
امس، البارحة

esperantologio." La vortoj "..., 'alambiko' kaj 'alke-mio', havas kiel primaran etimon ne araban vorton sed helenan! ... Mi opinias, ke pli signifplena estas aranĝo de la vortoj ne laŭ alfabeto ordo sed laŭ kulturaj kategorioj."

La sekva listo inkluzivas nur vortojn el *Plena ilustrita vortaro*, pri kies araba deveno konsentas Cherpillod, Golden kaj Utne (sen personaj, lokaj kaj la

Internacia Lingvo. La komisiono celas juĝi verkojn objektive, tiel ke ili sen ruĝiĝo povu stari apud similgenraj verkoj en naciaj lingvoj kaj inde reprezenti nian kulturon ankaŭ al la ekstera publiko. La celo estas eldonigi tiujn librojn en kiel eble plej multaj naciaj lingvoj.

2) *Festivalo de originala Esperanto-literaturo*. EVA klopodos en ĉiujara manifestacio ekde 1986 prezenti la originalan Esperanto-literaturon al la esperantistaro, sed precipe al la neesperantista publiko naci-lingve, en la formoj de teatraĵoj, teatrigita prozo, recitalo de poezio, kantado ks. Tia prezentado faru ĉefe profesiaj teatroj ene de siaj regulaj repertuaroj. La unua tia evento eventuale okazos fine de 1986, samtempe en Jugoslavio, Hungario kaj Italio.

Por prepari la necesajn verkojn, EVA diskonigos konkurson pri verkado kaj adaptado de verkoj.

3) *Kontrolado de manuskriptoj*. EVA organizis komisionon por kontroli manuskriptojn, al kies membroj verkintoj de libroj, prelegoj, artikoloj ks. povos, same kiel iliaj eldonontoj, submeti la manuskripton por lingva kontrolo kaj propono pri ŝanĝoj. La komisionanoj laboros laŭ difinita tarifo, pagota de la petanto de la kontrolo, kiu rajtos elekti la kontrolontan personon.

4) EVA celas kontraŭbatali *literaturan piratadon* kaj pledos por justa kompenso por verkista kaj tradukista laboroj. Ni alvokas la eldonistojn konsideri la verkiston sia nemalhavebla kunlaboranto, same kiel la pre- sisto, librobindisto ktp.

En la Universala Kongreso en Vankuvero EVA kaj UEA subskribis kontrakton pri kunlaboro kaj reciproka helpo en la realigo de komunaj celoj.

Tibor Sekelj

Recenzoj

Grava, sed plibonigebla lernolibro


Uĉebnik jazyka esperanto, Z.V. Semanova kaj M.I. Isaev. Moskvo: Nauka, 1984. 244 + 20p. Ilus. 22cm. Prezo: 21,00 gld.

La apero de presita lernolibro de Esperanto por ruslingvanoj – la unua de pluraj jardekoj – en si mem estas treege ĝojiga fakto. La eldonkvanto de 30 000 ekzempleroj verŝajne elvokas envion ĉe ĉiuj alilanda- naj eldonistoj de tiaj libroj; por Sovetio ĝi supozeble tamen estas apenaŭ sufiĉa.

Temas pri ambicia lernolibro, kiu, laŭ la antaŭpa- rolo, povas esti uzata kaj por studado en grupo kaj por memstudado. Ĝi konsistas el antaŭparolo, enkonduko pri la prononco, 25 lecionoj (skribitaj laŭ tradicia lernolibra stilo), gramatiko, "krestomatio" kun elektitaj tekstoj en Esperanto, vortlistoj kaj naŭ- paĝa bildvortaro. La krestomatio ebligas al novaj esperantistoj konatiĝi kun la tradukita literaturo de Esperanto, legi politikajn kaj beletrajn tekstojn en ĝenerale bonega lingvaĵo. Ankaŭ la originala litera- turo estas reprezentita per kelkaj tekstoj (Baghy, Zamenhoj k.a.). Laŭdinde estas la sufiĉe ampleksa Esperanto-rusa vortaro, kiu permesas uzi la lernoli- bron sen samtempa uzo de aparta vortaro.

La bona impresado, kiun la libro donas ĉe la unua trarigardo, bedaŭrinde iom perdiĝas ĉe zorga tralego. La fonetika enkonduko estas ne nur tro konciza, ĉefe por memstudado, sed ĝi entenas ankaŭ plurajn stran- gaĵojn kaj erarojn. La rekomendita prononco de la

Esperanta vokalo [i] kiel [ы/y] en la rusa vorto *nacia*, kutime uzata de ruslingvanoj post la konsonantoj [c] kaj [ŝ] sub la influo de la rusa fonologia sistemo, estas tre ĝena prononcmankado, kiun per ĉiuj fortoj devus kontraŭbatali bona lernolibro. Laŭ la menciita pro- noncregulo la pronomoj "mi", "vi" devus soni kiel la rusaj pronomoj *my*, *vy* – prononcmankado, kiu certe frapus eĉ rusan esperantiston. Multo estas dirinda pri la 10-linia priskribo de la Esperantaj konsonantoj. Laŭ la aŭtoroj ilia prononco principe korespondas al "la respektivaj sonoj de la rusa lingvo". Tiu regulo estas tre misgvida: ĉu oni prononcu, do, la Esperant- an [t] kiel en la rusa *teatr* aŭ kiel en *tot*? La diferenco estas ja grandega! "Tia", prononcita de ruslingvano, tre facile povas aŭdiĝi kiel "cia". Pri [l] la aŭtoroj diras, ke oni prononcu ĝin pli "malmole" ol en *ljul'ka*



**La unua presita lerno-
libro de Esperanto
por ruslingvanoj de
pluraj jardekoj.**

kaj pli "mole" ol en *loŝad* – tute ĝuste, sed ĝi ankaŭ ne sonu kiel en *lipa*, kiel rekomendas la aŭtoroj! Man- kas la grava informo pri la evitenda asimilado de kon-

sonantoj interne de radiko, ĉe morfemlimo kaj inter du vortoj ("ekzerco", "subtaso", "volas diri" anstataŭ *egzerco*, *suptaso*, *volaz diri*).

Ankaŭ la lecionoj mem bedaŭrinde entenas multajn erarojn, strangaĵojn kaj rusismojn. La difina artikolo estas uzata pli-malpli arbitre – apenaŭ ekzistas teksto, kie ne mankas almenaŭ unu difina artikolo. La fakto, ke la ĝusta uzo de la difina artikolo estas unu el la plej malfacilaj gramatikaj fenomenoj por lernantoj, kies gepatra lingvo ne konas artikolojn, necesigas kaj bonegan gramatikan klarigon kun klaraj ekzemploj kaj, kompreneble, senriproĉan kaj naturan uzon de la artikolo en la lecionoj mem. La aŭtoroj dediĉas al tiu problemo 11 liniojn: kvin regulojn (el kiuj unu estas nekomprenebla, unu banala kaj aliaj tro konci-zaj) kun du ekzemploj!

El la lingvaj strangaĵoj, parte rekte influitaj de la rusa lingvo, mi citu nur kelkajn: p.10: *Kiu estas via amo?* (Devus esti *Kio...*); p.22: *Mi estas ĉe telefono.* (parolas...); p.23: *Ĉe la fabriko estas vespera instituto.* (Al la fabriko apartenas...); p.46: *Li sidas en la klaso.* (...klasĉambro); *Rigardu sur la mapon de Sovetunio.* (Rigardu la mapon...); p.51: *Ĉe la eniro (enirejo)*; p.63: *Morgaŭ matene... mi forflugas Moskvon* (-os; ofta eraro); *En Moskvon alveturas homoj* (al Moskvon veturas/venas...); p.122 (en magazeno) *Ŝufako, ...fako kun manteloj (sekcio).*

La lernolibro ne estas malbona; ĝi estas plibonigebla kaj plibonigenda. Ĉiuj supre menciitaj malglataĵoj estus facile eviteblaj, se la aŭtoroj estus konsultintaj kelkajn alilingvajn kompetentajn esperantistojn. Restas al ni la espero, ke dua, korektita eldono aperos en ne tro fora estonteco.

Ingrid Maier (Svedio)

Romano de originala ĝenro

Ombro sur interna pejzaĝo, Spomenka Štimec (1949). Pisa: Edistudio, 1984. 141p. 22cm. Bind. ISBN 88 7036 019 9. Prezo: 24,00 gld.

Oni kutimas difini la originalan Esperanto-literaturon kiel literaturaĵojn verkitajn rekte en la Internacia Lingvo. Tiu lingva kriterio certe ne sufiĉas, ĉar vere originala verko devas ankaŭ koncerni la Esperantan mondon kaj tiel kontribui al nia kulturo. Tiaj literaturaĵoj estas raraj, sed ofte ĉefverkoj de nia literaturo, kiel pruvas *La infana raso* de Auld aŭ *Pretertempe* de de' Giorgi.

En la tre originala romano *Ombro sur interna pejzaĝo*, juna profesia Esperanto-aktivulino – kiu, laŭ la neutila "Antaŭbabilo de la Eldonisto", identas kun la aŭtorino – priskribas la ŝanĝon de sia vivosituation post la malsukceso de vivado kun alilanda esperantisto. Per diverslongaj "scenoj", kvazaŭ ĉapitroj, ŝi

penetrigas la legantojn en sian mondon. Tie, ni konatiĝas kun la problemoj de profesia esperantisto, sentas la etoson de esperantista hejmo kaj renkontas malnovajn amikojn. La "internaj ideoj" de la rakon-

Ĉu nova ĝenra kategorio necesas por priskribi la verkon Ombro sur interna pejzaĝo?



tantino finfine pensigas nin pri nia Esperanto-aktivado kaj, pro la ofte intima ligo inter tiuj, pri nia privata (aŭ eĉ profesia) vivo.

La stilon karakterizas luda, foje eble tro senzorga uzo de ĉiutage parolata lingvo. Superregas la pronomo *mi*, kiu opozicias al la pronomo *li*; tiu ĉi tamen dumtempe maloftiĝas. Per dialogoj inter la rakontanta *mi* kaj ties interna voĉo, la aŭtorino kreas tension, kiu multe vivigas la priskribojn de la "interna pejzaĝo". La kursivaj litertipoj, al kiuj la leganto verŝajne nur malfacile kutimiĝos, volas ankoraŭ pli efikigi la personan stilon de la libro.

Dank' al sia scena disdivido, la verko liberiĝas de kronologia ĉeno. La scena sinsekvo, interrompita per rakontoj, kiel tiuj pri Nataŝa kaj pri Valentina (la skribmaŝino), permesas videbligi unuarange internan, t.e. animan evoluon. Tiu tekniko memorigas pri literatura skolo, ofte etikedita "Nova romano". Eble pro tio, la libro subtoliĝas "romano". Sed ĉu ĝi vere apartenas al tiu ĝenro? La verko de Spomenka Štimec, unika persona atestaĵo, en kiu ĉiu esperantisto retrovas sin mem, estas tiel originala, ke taŭga ĝenronomo ankoraŭ trovendas.

Martin Haase (Francio)

Amopoezio sen kliŝoj

Elprovado de l' amo, Antun Šimunić (1948). El la kroata trad. Lucija Borčić. Osijek: Esperanto-Societo "Liberiga Stelo", 1984. 18p. Ilus. de V. Džanko. 21cm. Prezo: 7,50 gld.

Ampoezion similan al la biblia Alta Kanto prezentas *Elprovado de l' amo*. Dialogas junulo kaj junulino pri sia reciproka amo. La aŭtoro sukcesis priskribi la

diversajn ĉiutagajn aspektojn de amo:

Kiam mi ĉesas labori por voki vin telefone

Ĉu tio do amo estas, Ljiljo?

Kiam vendoplace mi aĉetas blankan florfasketon

Ĉu tio do amo estas, Ljiljo? (p.8)

Pro ĉio ĉi la poemaro fariĝas la kontraŭo de banalo. Amopoezio estas oftaĵo kaj tial ne malofte ĝi estas neoriginala. La verkinto de tiu ĉi kajero tamen evitis la ordinaraĵn amokliŝojn, kaj tio vere legindigas la verkon, kiu neniam fariĝas teda.

La traduko estas lerta kaj bonstila. Tamen *alkista* (p.3) estas malklara vorto. Ĉu ĉasista? *Neniam fluĉesos la vortoj el tiu fonto mirakla* devus esti "ĉesos" aŭ "ĉesos flui"; *selekton* (p.18) devus esti "elekton" aŭ "kolekton". Ĝenas la legadon malbona preso, pro kiu la paĝoj abundas je punktetoj kaj la literoj ie estas malklaraj. La presmaniero ne ebligas tutan ĝuon de la elegantaj ilustraĵoj.

Mi demandas, ĉu ne estus pli bone prokrasti la eldonadon por enigi la poemon en pli grandan estontan antologion aŭ kolekton kun pli bona teknika kvalito. La enhavon mi tamen ĝuis kun granda plezuro.

Leif Gunnar Nordenstorm (Svedio)

Siaspeca libro pri ĉio

Satana anĝelo, G.R. Ledon. El la franca kaj portugala trad. S.S. Ledon. San-Paŭlo: la aŭtoro, 1983/84. 205+136p. 21cm. Trilingva: Esperanta, franca kaj portugala. Prezo: 12,90 gld.

Jen libro tute siaspeca. Jam sur la kovrilo ĝi anoncas sin tia: sen prezo, kiel libero. Verkita en tri lingvoj, kun tradukoj de la francaj kaj portugalaĵaj ĉapitroj en aparta kajero.

Sed pri kio temas? Pri ĉio. Laŭdire ĉiu homo portas en si libron – pri la propra vivo. Jen tia libro – sed pri la opinioj de la aŭtoro pli ol liaj spertoj. Pri socio de senpoŝaj pantalonejoj (do aĉetu mansakon!), de diverskoloraj paperpecoj (plastigitaj, tubformaj kun rubandoj...), de novaĵoj ĉiam la samaj, nur malsamaj nomoj por makuli pugpaperon (se oni ne uzas la personecigitan proponatan de Anĝelo!), pri la fido de buĉotaj ŝafidoj... Do tiujn opiniojn li komencas prezenti tre distre: de la vidpunkto de Anĝelo, alinome Zofio, alivorte azeno. Bedaŭrinde la recenzanto ne ĉiam akceptas la gvidadon de Anĝelo: vidante paĝojn plenŝtopitajn per vortoj kiel plusvaloro, kapitalo, konsumsocio, mi streĉas mian azenan kolon ĝis pia majuskla A. Ne ĉar mi trovas la opiniojn neinteresaj, sed ĉar, ŝatante Anĝelon, mi esperas ion plian.

Fine venas tamen alispeca surprizo: la lasta ĉapitro estas tute malsama, vizio pri postbomba mondo post mil jaroj, en kiu oni lernis pli saĝe profiti el teknologio. Do oni manlaboras, terkulturas, ne plu loĝas en urboj – sed ekzemple uzas satelitojn por regi

la veteron: jes, ne prognozi, sed ĝuste regi, por ŝanĝi se necese, ekzemple por pluvigi. Jen kromokupo de la ĉefrolanto... Bone, ke ekzistas tiaj libroj.

Kris Long (Britio)

Skriberoj ne sufiĉas

Ajn – senvortaĵoj kaj aliaj poemoj, Jarl Hammarberg (1940). Stokholmo: Författares Bokmaskin, 1983. 143p. Ilus. 29cm. ISBN 91 7328 387 8. Prezo: 30,90 gld.

En la sinprezento komence de ĉi tiu volumo (certe ĝia parto plej atentokapta), la aŭtoro, en iom sinbalanca Esperanto, skribas: "Mia poeta elirpunkto malofte estas frazo, sed vortoj (aŭ literoj aŭ aliaj skriberoj)". Kaj, por pravigi sian starpunkton, li skizas la evoluon de historiaj movadoj, kiaj la dadaismo, kubismo, konkreta arto, kiuj teoriadas pri la rilatoj inter bildarto kaj la grafika formo de literaturo.

Laŭ persona opinio, tamen, tiuj movadoj estas, fakte, historiaj, kaj la produktaĵoj de Hammarberg (poemoj el numeroj, parentezoj, senrilataj literegoj) ŝajnas eĉ malsuperaĵoj al siaj artismaj modeloj (kiuj jam estis, verdire, sufiĉe nelegeblaj). En la efektivo okazas, ke la mikrokosmo de avangardo komencas perdi eĉ sian "mikropublikon", kaj novaj, pli vastrenomaj fortoj venas sur la scenejon.

Kredeble finiĝis la tempo de eksperimentoj, kaj la publiko volas aŭdi ion pli strukturitan, ankaŭ tial, ke ĝuste la strukturo konsistigas, eble, la bazon de artaj emocioj. Belecon ni trovas nek en vortoj, nek en literoj aŭ aliaj "skriberoj", sed ĝuste en la frazo, en ties strukturo kaj kontrapunkto, kies neelĉerpebla varieco ĉiam kapablas tuŝi nian emocion kaj eldevigi nian estetikan aprobon.

Mauro Nervi (Italio)

Trafa prezento

Kio estas Esperanto?/Que é o esperanto?, Sylla Chaves (1929). Rio-de-Janeiro: Brazila Esperanto-Ligo, 1983. Duflanka monofona disko, 33t/m, 18cm. Prezo: 14,40 gld.

Ĉi tiu simpligita kurso de Esperanto por portugallingvanoj kun akompano de kompakta disko estas originala maniero disvastigi Esperanton. Ĝi tutcerte meritas ripetigon en aliaj lingvoj. La kurso estas prezentita sur unu sola folio granda je 57×76cm., faldita dekduoble. Sur unu flanko de la folio estas trafa informamaterialo, eĉ kun fotoj kaj desegno, en kiu la aŭtoro klarigas kio estas Esperanto kaj kial valoras lerni ĝin. En la alia flanko estas la leciona parto.

Supraĵe, sed klare kaj trafe, estas prezentitaj la gramatiko kaj aldone konversaciaj tekstoj en Esper-

anto kaj la portugala lingvo paralele. Ĉi tiuj tekstoj estas elparolataj por instrui la prononcon. Plue akompanas la tuton listo de vortoj kaj afiksoj. Do, ĝi tre taŭgas por memlernado.

Kvankam mi tre entuziasmiĝis pri la prezentita ideo, mi opinias, ke la presita teksto estus multe pli praktika kaj alloga en formo de broŝuro.

La disko, kvankam ne ampleksa (ĉirkaŭ po ses minutoj sur ĉiu flanko), enhavas sufiĉe por instrui la elparolon. La tekston dividas muziko kaj ĉe la fino aŭdiĝas kantoj en Esperanto.

Joaquim Calado (Nederlando)

Kun pesimismo kaj optimismo

Pensoj kaj protestoj, Feiko Munniksma (1915). Kopenhago: Eld. Perspektivo, 1984. 37p. Ilus. de Pierre Gaborit (1924). 21cm. Prezo: 9,00 gld.

Facetoj, Rejna de Jong. Leiden: la aŭtoro, 1984. 42p. 21cm. Prezo: 5,10 gld.

Japano pli kompetente, ol homo heredinta la okcidenteŭropan kulturon, recenzus la broŝuron *Pensoj kaj protestoj*, kiu enhavas senrjuojn, malavare ilustritajn per tuĉpentraĵoj, ambaŭ originalaj.

Laŭ la difino en *Japana enciklopedieto*, senrjuo estas samforma kiel hajko, sed humura kaj ofte epigrama. Nu, la aŭtoro pri si mem konfesas: "Esenca trajto estas lia malfido al aŭtoritato kaj potenco. Spertoj dum kaptiteco sub la nazioj konsiderinde reduktis lian hombildon." Liaj poemetoj do ne povas ne speguli lian profundan pesimismen kaj lian anarkiisman tendencon. Preskaŭ ĉiam li per tiuj kon-

Kvankam la tuĉpentraĵoj, laŭ postparolo, akompanas la spiriton de la senrjuoj, eble pro sia delikateco ili ne vekas tian malĝojon kiel la poemetoj.

La nova broŝureto *Facetoj* de Rejna de Jong sekvas ŝian stilon kaj la temojn de la antaŭa *Divershumore* (1980). Mallongaj poemoj pri plej diversaj aferoj – la naturo, personaj travivaĵoj kaj sentoj, iom da filozofiumado, kiuj ĉiuj reflektas ŝian vivoĝojon kaj optimismon. Ŝi esprimas sin per simplaj kaj klaraj versoj, ie kaj tie enmetante trafajn metaforojn, kiel reĝo Frosto teksante per blanka ŝtofo kaj reĝin' Degelo el ĝi poste eltondante vestojn por siaj korteganinoj, aŭ kiam la aŭtorino brodas la tempotapiŝon, aŭ kiam la sun' monerojn ŝutis el sia orpokalo. Bedaŭrinde poeto ne povas prikanti sole la agrablajn facetojn de la vivo. Li aŭ ŝi ne rajtas silenti pri ĝiaj malbelaj flankoj, ĉi-kaze la sociaj maljustaĵoj. Tiujn la aŭtorino tamen tiel lerte enplektas en la tutaĵon, ke la fina impresado fariĝas malpeziga al nia spirito. Same kiel pri la antaŭa ŝia verketo mi petas: Baldaŭ revenu kun pliaj kaj pli multaj, Rejna!

Leopoldo H. Knoedt (Brazilo)

Laste aperis...

Akademaj studoj 1985, red. Rüdiger Eichholz (1922). Bailieboro: Esperanto Press, 1985. 242 + 76p. Ilus. Mimeo. Teme tre diversaj originalaj kaj represitaj artikoloj kaj studoj pri pasivaj participoj, landnomoj, terminologio, perkomputila traduko k.a. Prezo: 45,60 gld.

Amuza legolibro en Esperanto, Albert Lienhardt (1904), Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1984. 216p. Ilus. de István Endrödi. 21cm. ISBN 963 571 124 7. Cent gradigitaj legaĵoj por junaj lernantoj en facila stilo, kun du mil instruaj demandoj kaj respondoj. Prezo: 16,50 gld.

Betonterapio/Betonterápia, János Elem. El la hungara trad. Péter András Rados. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1985. 35p. 21cm. Dulingva: Esperanto-hungara. ISBN 963 571 155 7. Absurdisma teatraĵo por du aktoroj. Prezo: 6,00 gld.

Damo de l' fatalo, La; Tragikomedio, László Tabi. El la hungara trad. Vilmos Benczik. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1985. 43p. 21cm. ISBN 963 571 154 9. Distra teatraĵo pri geedziĝo pro financaj kialoj. Prezo: 6,60 gld.


Dio, kristanismo, aliaj religioj (1983), Gerrit Berveling. El la nederlanda trad. la aŭtoro. Vlaardingen: Voĉoj Kristanaj, 1985. 36p. 21cm. VK7. Universitata traktaĵo pri interreligiaj rilatoj, kun bibliografio. Prezo: 4,20 gld.

Du el, Marjorie Boulton (1924) kaj Poul Thorsen (1915). Antverpeno/La Laguna: TK/Stafeto, 1985. 250p. Ilus. de Jean Bomford. 22cm. ISBN 90 6336 033 9. Duela duopo de du soci-konsciaj kaj humurplenaj poetoj prezentas komunan volumon de tre varia poezio. Prezo: 33,00 gld.

cizaj 5-7-5-silabaĵoj sukcese transdonas sian mesaĝon, en kiu neniu eĉ plej malgranda lumeto brilas fine de la tunelo.

Esperanto kiel interlingvo en maŝina tradukado (1985), de Rüdiger Eichholz (1922). Bailieboro: Terminologia Centro de ISAE, 1985. 24p. Mimeo. 29cm. Represaĵo de komentoj pri la perkomputila tradukprojekto Distribuita Lingvotradukado (el *Akademias studoj* 1985). Prezo: 5,40 gld.

Esperanto-kurso por memlernado; Unua volumo, Li Shijun. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1985. 330p. Ilus. 19cm. Dekok-leciona lernolibro por ĉinlingvaj komencantoj, kun ampleksaj tekstoj, interparoloj, tradukoj, gramatikaj klarigoj, ekzercoj kaj gramatika kaj ekzercosolva apendicoj plus 42-paĝa Esperanta-ĉina vortaro. Prezo: 24,00 gld.



Evangelio laŭ Maria Magdalena, Gerrit Berveling, Vlaardingen: Voĉoj Kristanaj, 1985. 12p. 21cm. VK8. Teksto de prelego pri fragmento de evangelio. Prezo: 1,80 gld.

Iu instruisto – Celestin Freinet (1979). El la franca trad. Esperanto-Komisiono de ICEM. Valence-sur-Baise: ICEM-Esperanto, 1984. 24p. Ilus. 21cm. Fote ilustrita informilo pri la vivo kaj pedagogiaj metodoj de Celestin Freinet (1896-1966). Prezo: 5,10 gld.

Kaverno apud la maro, Bertram Potts (1895). Antverpeno/La Laguna: TK/Stafeto, 1985. 228p. 22cm. ISBN 90 6336 025 8. Dek unu noveloj originale verkitaj en Esperanto, de aŭtoro ŝatata pro sia novelarto kaj poezio. Prezo: 27,00 gld.

Kiel administri, librotendi? Parizo: Unuiĝo Franca por Esperanto, 1985 (ne indikita). 48p. Mimeo. 30cm. Konsiloj pri administrado kaj kontado por lokaj federacioj de Esperanto-grupoj. Prezo: 15,60 gld.

Kontribuo al lingvaj teorio kaj praktiko 1 kaj 2. Poprad: Slovacia Esperanto-Asocio, 1983/4. 59 + 79p. Mimeo. 20cm. Dek du prelegoj (i.a. pri la genro, fonologio, terminologio, tipologio, tradukado, instruado) el la lingvistikaj seminarioj en Nitra (1982/3). Prezo: 15,00 gld.

Li kaj ni; Festlibro por la 80a naskiĝtago de Gaston Waringhien, red. Reinhard Haupenthal (1945). Antverpeno/La Laguna: TK/Stafeto, 1985. 520p. Ilus. 22cm. ISBN 90 6336 034 7. Pompa volumo, al kiu kontribuis 49 konataj eminentuloj sur diversaj kampoj i.a. per originalaj literaturkritikaj, esperantologiaj kaj interlingvistikaj artikoloj; kun biografio pri Waringhien kaj la kontribuoj kaj bibliografio de la verkaro de Waringhien (plus faksimiloj de korespondaĵoj de Zamenhof). Prezo: 66,00 gld.

Nomaro de britaj birdoj / British Bird Names, Komp. Edward Ockey (1913). Banstead: Mondlingvaj libroj, 1985. 15p.

Mimeo. 21cm. Alfabeto ordigita laŭ la anglaj nomoj kun ekvivalentoj en Esperanto, la latina, franca kaj germana; kun bibliografio. Prezo: 3,00 gld.

Novaj perspektivoj/Nove perspektive, Antun Šimunić. Osijek: Esperanto-Societo Liberiga Stelo, 1984. 54p. Ilus. 20cm. Dulingva: Esperanta-kroatserba. Epizodoj el la historio de la Esperanto-societo de Osijek, Jugoslavio. Prezo: 12,00 gld.

Por disaŭdigi, A. Lopez Luna. Bonaero: Amigos de Lopez Luna, 1985. 54p. Mimeo. 18cm. ISBN 950 43 0135 5. Dek ok rakontoj. Prezo: 5,40 gld.

Propedeŭtiko de la klerigscienco perspektiva / Vorkurs zur Prospektiven Bildungswissenschaft, de Helmar G. Frank (1933). Tübingen: Gunter Narr Verlag, 1984. 8 + 126p. Grafikaĵoj. 21cm. Dulingva: Esperanta-germana. ISBN 3-87808-706-3. Universitatnivela antaŭkurso pri pedagogio. Prezo: 31,80 gld.

Reformacio, La, Agostinho da Silva. El la portugala trad. Eduardo Padrão. Famalicão: la tradukinto, 1984. 27p. Ilus. Mimeo. 22cm. Kajero 7. Historio pri la Reformacio: krista religia revolucio de la 16a jarcento. Prezo: 1,50 gld.

Voĉeto en la dezerto, A. Lopez Luna. Bonaero: Amigos de Lopez Luna, 1984. 102p. Mimeo. 17cm. ISBN 950 43 0076 6. Dek diverstemaj verkoj, i.a. teatraĵo kaj krimnovelo. Prezo: 7,20 gld.

Vojaĝoj de Livingstone, La, Agostinho da Silva. El la portugala trad. Eduardo Padrão. Famalicão: la tradukinto, 1983. 32p. Ilus. Mapo. Mimeo. 22cm. Kajero 5. Biografio pri la skota misiisto-esploristo David Livingstone (1813-1873). Prezo: 1,50 gld.

Vojaĝoj de Stanley, La, Agostinho da Silva. El la portugala trad. Eduardo Padrão. Famalicão: la tradukinto, 1984. 27p. Ilus. Mapo. Mimeo. 22cm. Kajero 6. Biografio pri la brita esploristo Henry Stanley (1841-1904). Prezo: 1,50 gld.

Vualo de l' tempo, La, J.H. Sullivan (1913). Antverpeno/La Laguna: TK Stafeto, 1985. 116p. 22cm. ISBN 90 6336 028 2. Dudek originalaj noveloj de verkisto konata pro siaj krimnoveloj por infanoj. Prezo: 19,50 gld.

Diversaĵoj:

Bukedo el la hungara poezio; Poemoj el Hungara antologio, red. Vilmos Benczik (1945), reĝisoris István Iglódi. Budapeŝto: Hungaroton, 1985. 30cm. 33t/m. Duflanka, stereofona. SLPX 13955-56. Du longedaŭraj diskoj "kun la kremo de la poezia materialo" (44 poemoj de 24 poetoj de la 14a jarcento ĝis la nuntempo) el *Hungara antologio* (1983), deklamita de 12 elstaraj hungaraj geaktoroj; en duobla kovrilo el kartono. Prezo: 36,00 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 5%, kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 19% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5,00 guldenoj. Antaŭdankon pro via mendo!

Kontribuojn sendu al la ĝenerala sekretario de TEJO: N. Saletti, Via Libia 20/4-1, I-40138 Bologna.

Seminario por gvidantoj de TEJO en Pollando

En la tradicio de la plej strikte "laboraj" kunvenoj de TEJO, plenrajte eniras la seminarioj, kiujn organizas Pola Studenta Esperanto-Komitato (PSEK), kunlabore kun TEJO.

La Seminario por Gvidantoj de TEJO/PSEK okazis de la 10a ĝis la 17a de aprilo en la urbeto Kazimierz Dolny, ĉe la rivero Vistulo, en centra Pollando. La paĝo, kiun partoprenis sepdeko da homoj el ok landoj, inkluzive observanton de Junulara Sekcio de Esperanto-Asocio en Kulturligo de Germana DR, ludis gravan rolon en la ĝenerala agado de TEJO. En ĝi estis diskutita la projekto de nova Regularo de TEJO, prezentita de la estraro al la komitato jam en januaro (vidu malsupre kaj sur p.81). Al la laborgru-



Modest Błasiak (maldekstre), prezidanto de la Loka Kongresa Komitato, kaj N. Saletti diskutas antaŭ ol akcepti Krakovon kiel la IJK-kongresurbon de 1987.

poj pri la Regularo, pri la agado de la Komisiono pri Aktivula Trejnado kaj pri la Jubilea Jaro, aldoniĝis pluraj prelegoj, kies celo estis transdoni spertojn aŭ enkonduki temojn, detale pritraktotajn en malgrandaj grupoj.

TEJO strebas spertigi siajn aktivulojn kunvokante ilin al aranĝoj kiel tiu organizita de PSEK, por ke estu kiel eble plej multe da interŝanĝo de ideoj kaj spertoj. "Generacioj" en TEJO estas mallongaj, do estas necese gardi la kapablojn de la homoj, kiuj pro sia aĝo lasas la junularan movadon. La laboro de la Komisiono pri Aktivula Trejnado estas certigi al TEJO koheran estontecon.

Inter la prelegoj de la seminario mi citu "Doktrino de L.L. Zamenhof" de J. Parzyszek, "Renovigo de la koncepto pri landa sekcio" de N. Saletti, "Enkonduko en esperantologion" de R. Rokicki, "Sciencaj aktivadoj kaj Esperanto" de P. Janowczyk, "Generaciaj dilemoj" de J. Leyk, "Amaskomunikiloj kaj Esperanto" de L.F. von Wunsch-Rolshoven kaj "Esperanto-instruado kompare al tiu de aliaj lingvoj" de I. Szanser. Oni jam planas similan seminarion por la venonta jaro, denove en Pollando, kie PSEK aktivas en Asocio de Polaj Studentoj. La antaŭvidata temo, "Komisiono pri Eksteraj Rilatoj: kiucele?", celas diskutigi la "eksteran" agadon de TEJO, por ĝin vastigi kaj plibonigi.

Pri IJK 1987

Dum sia dusemajna restado en Pollando, la ĝenerala sekretario de TEJO, N. Saletti, vizitis ankaŭ la interesan 3an Internacian Festivalon de Esperantaj Teatroj en Zielona Góra kaj la studentan urbon Krakovo, kie en 1987 okazos la 43a Internacia Junulara Kongreso de TEJO. La reprezentanto de TEJO vizitis la proponitan kongresejon kaj trovis ĝin tute taŭga. La organizantoj atendas mil partoprenantojn. Saletti renkontiĝis kun la vicurbestro kaj reprezentantoj de Asocio de Polaj Studentoj. Ekplanu jam nun vian partoprenon en la jubilea IJK!

Nova regularo de TEJO

Estas necese por ĉiu asocio adapti sin kaj siajn ĉefajn dokumentojn al la evoluo de la ĉirkaŭa mondo. Tio des pli validas por junularaj organizoj, kiuj devas fronti al rapide ŝanĝiĝanta homgrupo. Pro tio TEJO sentis la neceson ŝanĝi parton de siaj reguloj, kaj la nuna estraro kaptis la okazon plani reformon de sia tuta regularo, pli konformigante ĝin al la statuto kaj regularoj de UEA. En la komitatkunsidoj dum la pasintjara 40a IJK en Swanwick, Britio, oni starigis komisionon, kiu prezentis sian proponon unue al la estraro kaj due al la komitato de TEJO. La estraro diskutis ĝin dum sia kunsido en Prago pasintan januaron, kaj pliaj diskutoj okazis dum la supre menciita seminario en Pollando. La komitato de TEJO fintraktos ĝin dum la 41a IJK en Eringerfeld, FR Germanio, por posta prezento al la komitato de UEA, kies aprobo de la Regularo necesas.

Ian Jackson, prezidanto de TEJO, havas novan adreson: 2505 Edinburgh Tower, The Landmark, 15 Queens Road Central, Honkongo.

Norberto Saletti, ĝenerala sekretario de TEJO, havas novan telefonnumeron: (051) 39 96 16.

● **Brazilo:** La numeroj 37 kaj 39 de *La lampiro*, organo de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo, publikigis liston de la Esperanto-organizaĵoj en Brazilo. Laŭ tiu adresaro montriĝas, ke la lando havas 111 Esperanto-organizaĵojn, el kiuj la pliparto kompreneble konsistas el lokaj societoj.

● **Finnlando:** Al la pluraj novaj utilaj fondusoj de la Esperanto-movado lastatempe aldoniĝis en Finnlando Memorfonduso Silja Tietti. La fonduson administras Esperanto-Asocio de Finnlando, kun kundecidrajto i.a. de Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO). Memore al la siatempa sekretario de FEJO Silja Tietti (1959-1980), la fonduso mone subtenos agadon kaj studadon de la Internacia Lingvo inter junaj esperantistoj de la lando.

● **Italio:** Ankoraŭ unu radiostacio elsendos en Esperanto. Ĝi estas la loka itala stacio Radio International (strada P. Palio 36, I-37100 Verona, Italio), kiu ekde la 2a de septembro dufoje semajne disaŭdigos 10-minutan Esperantan programon: lunde kaj ĵaŭde je 22h30 (1621 kHz kaj MF 100.5 kaj 100.8). Verona Esperanto-Grupo invitas ĉiujn aŭskultantojn skribi al la stacio por subteni la novan elsendon.

● **Svedio:** Oni demandas, ĉu la estraro de Esperanto-Klubo de Bengtsfors (Bengtsgården, S-666 00 Bengtsfors, Svedio) estas la plej juna en la mondo. Post informado en la lernejo Bengtsgården, dek kvar gejunuloj fondis la klubon komence de junio. Ili havas malpli ol 14 jarojn kaj bonvenigos kuraĝigajn salutojn el la tuta mondo por pluvarbi.

● **Lingvistiko:** En n-ro 3-1/1984 de *Multilingua*, revuo por interlingva komunikado, eldonata de Mouton (Amsterdamo) sub aŭspicio de Komisiono de la Eŭropaj Komunumoj, aperis

la anglalingva artikolo "Of one language, and of one speech": Artificial languages and international communication" de J.A. Large (Kimra Kolegio de Biblioteka Scienco), Britio. La 7-paĝa

Foto: Fotos Aragonés



● **Hispanio:** Antaŭ nelonge oni transdonis Hispanan Esperanto-Muzeon al la fondaĵo Heredposedaĵo de la Muzeoj de la Parlamento de Katalunio. La foto montras momenton en Sant Pau D'Ordal, dum kiu la prezidanto de Katalunio, Jordi Pujol (maldekstre), interparolas kun Luis Maria Hernandez Izal, la fondinto de la muzeo kaj nuna vicprezidanto de Hispana Esperanto-Federacio.



● **Norvegio:** La nove elektita prezidantino de Norvega Esperantista Ligo (NEL) estas Elna Matland (maldekstre sur la foto, kun prezidinto de NEL Kjell Gustavsen ĉe la memorŝtono de la fondinto de la norvega Esperanto-movado, Haldor Midthus, en Os). La elekto okazis en la kongreso de NEL meze de junio apud Bergen.

traktaĵo (kiu havas etajn resumojn en la germana, angla, franca kaj itala) estas aparte interesa pro sia objektiveco kaj informiteco. Ĝia bibliografio entenas i.a. verkojn de Boulton, Cavanagh, Forster, Hagler, Pei, Privat kaj Tonkin. Ni provos recenzi la artikolon en venonta numero.

● La 20an de aprilo, en la 20a Internacia Konferenco de Geolingvistiko en Universitato de Novjorko, organizita de Usona Societo pri Geolingvistiko, d-ro Julius Balbin prezentis sian prelegon "Ĉu Esperanto estas latinida lingvo?". Ĝi vekis konsiderindan atenton kaj multajn demandojn. Tio estas jam la tria fojo, kiam d-ro Balbin parolis pri la Internacia Lingvo sub aŭspicio de la societo, de kiu li ĉi-jare estis elektita unua vicprezidanto. La societon siatempe kunfondis prof. Mario Pei, konata lingvisto kaj porparolanto de Esperanto.

● **Ŝako:** La hungara familio Polgar havas tri filinojn kun ekstrema talento por ŝakludo: Zsuzsa, Zsotia kaj Judit. La plej aĝa, Zsuzsa, en sia dekkvara jaro postrestis nur cent poentojn en la Elo-


mezuro (la mezuro por ŝakluda kapablo) al la mondĉampionino kaj gajnis en 1984, 15-jara, rapidmovan turniron, kiun partoprenis ankaŭ internacia majstro. Zsuzsa lernis plurajn lingvojn, i.a. Esperanton.

● **Biografioj:** Ĉi-monate aperos 260-paĝa anglalingva biografio pri Lidia Zamenhof (1904-1942), filino de L.L. Zamenhof. Ĝi estas *Lidia; The Life of Lidia Zamenhof, Daughter of Esperanto* (Lidia; La vivo de Lidia Zamenhof, filino de Esperanto), verkita de Wendy Heller. La eldonejo, George Ronald (Oksfordo, Britio), kaj UEA kunlaboras por povi ekvendi la libron dum la Universala Kongreso en Aŭgsburgo.

● **Fervojoj:** De la 1a de majo ĉi-jare validas nova interŝtata reglamento pri la ĉernacia fervoja trafiko (COTIF). Jam monaton antaŭ tiu pretiĝis Esperanta traduko dank' al Jugoslavia Asocio de Fervojistoj. Interesitoj povas turni sin al ties adreso: Pf. 563, Nemanjina 6, YU-11001 Beograd, Jugoslavio.

● **Ĝemeligoj:** Lastatempe UEA ree alvokis siajn landajn asociojn kaj lokajn societojn ĝemeliĝi kun Esperanto-organizaĵoj i.a. en triamondaj landoj, cele al reciproka helpo. Lastatempe ĝemeliĝis Itala Esperanto-Federacio (IEF) kaj Esperanto-Societo (Malta). Unua rezulto el tiu tre bonvena pli intenca kunlaboro estos renkontiĝo de IEF kaj la malta societo en la baldaŭa estonteco ie en Suda Italio.

● **Poezio:** Fine de oktobro okazos internacia poezia festivalo en Leuven, Belgio. Oni jam konsentis inkluzivi en la programo duonhoran prezentadon de Esperanta poezio. La prezentadon faros la belga poetino Nicole Pairoux. Interesitoj povas skribi al s-ro M. Vanden Bempt, Duisburgsestraat 12, B-3030 Leuven, Belgio.



● **Informado:** Antaŭ nelonge Rüdiger Eichholz (en la bildo) eldonis bazan faldfolio pri Esperanto en po unu de 26 lingvoj. Ĝi nomiĝas "Interkompreno per Esperanto, la interetna lingvo". Eichholz pretas publikigi la folion en iu ajn lingvo, kondiĉe ke li ricevas fidindan kaj laŭeble fotopretan tradukon. La adreso estas: Esperanto Press, R.R.1, Bailieboro, Ontario, KOL 1BO, Kanado.

● **Recenzoj:** En la pasintjara aŭtuna numero de la kvaronjara literatura gazeto de Universitato de Oklahoma, Usono, aperis recenzo pri la Esperanta verko *Kiuj semas plorante...* (1984) de Éva Tófalvi kaj Oldřich Kníchal. La recenzon verkis d-ro Humphrey Tonkin, vicprezidanto de UEA.

derlando. La pensiigo de Sija fermas pordon al epoko por la laborantoj de la CO, kiuj deziras al ŝi multajn feliĉon kaj vojaĝadon dum la longa libertempo.

Nekrologoj

MARIO DAZZINI (1910-1985), doktoro pri juro, mortis la 1-an de junio en Massa, Italio. Siatempe prezidanto de Itala Esperanto-Federacio, li de 1968 estis sekretario de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. Dum kvar jaroj ĝis 1974 li estis la ĉefdelegito por Italio.

EDWIN F.DEAN (1900-1985) forpasis la 28an de aprilo en Norwich, Britio, kie li dum pli ol 30 jaroj estis magistratano. Li estis prezidanto de la Loka Kongresa Komitato de la 50a Jubilea Brita Esperanto-Kongreso, kiu okazis en Norwich en 1966. Memore al tio, li kiel mecenato poste fondis Jubilean Esperanto-Fonduson Norwich, kiu – hodiaŭ unu el la plej solidaj fondusoj de la tuta Esperantomovado – subtenas precipe junularan

Persone

● **van Wijngaarden:** La 31an de julio, post 28-jara laboro en la Centra Oficejo, pensiigos s-ino Sija van Wijngaarden. Ŝi komencis labori por UEA la 1-an de septembro en 1957, mallonge post la alveno de la Centra Oficejo al Roterdamo. Ŝi dum ĉiuj tiuj jaroj prizorgis ĉefe la membro-administradon kaj adresaron. Sija estas aparte konata pro utiligo de siaj libertempoj por vojaĝi per Esperanto al preskaŭ ĉiu lando de la mondo, kaj ni estas certaj, ke ŝia vojaĝemo ne malpliigos, kiam ŝi fariĝos la unua pensiita oficisto de UEA de post la translokigo de la Centra Oficejo al Ne-

Diskriminacio

krim

Diskriminacio

prelegoj kaj komentarioj

La Esperanto-movado kontraŭbatalas la lingvan kaj kulturan diskriminacion. *Diskriminacio* diskutigas ankaŭ pri aliaj diskriminacioj kaj donas proponojn por agado i.a. en klubvesperoj.

Diskriminacio traktas ★ la radikojn de diskriminacio ★ diskriminacion kontraŭ etnoj kaj rasoj ★ internacian ekonomian diskriminacion ★ diskriminacion kontraŭ virinoj ★ diskriminacion pro seksa orientiĝo ★ diskriminacion pro religio ★ maldiskriminacion kaj ★ lingvan diskriminacion.

Diskriminacio; Prelegaro el la 65a Universala Kongreso de Esperanto, red. Renato Corsetti. Rotterdam: UEA, 1984. 175p. 21cm. ISBN 92 9017 031 X. Prezo: 21,00 gld.

kaj edukon agadojn. La fonduso ĵus nomis ĉiujaran premion laŭ Edwin Dean. Li estis dumviva membro de UEA.

KENNETH G. LINTON (1906-1985) mortis la 9an de majo apud Melburno, Aŭstralio. Li modele plenumis la laboron de ĉefdelegito kaj peranto de UEA por Aŭstralio de 1955 ĝis sia forpaso. Li estis prezidanto de Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) de 1952 ĝis 1956, de kiam li laboris kiel kasisto, ĝis li denove estis elektita prezidanto en 1968. Li multe verkis en *Australian Esperantist* (Aŭstralia esperantisto) kaj tradukis (1983) la romanon *Sur la bordo* de Nevil Shute, sed lia propra verko *Kanako el Kananam* (1960), pri novgvineaj kutimoj kaj moroj, estas rimarkinda kontribuo al la originala literaturo de Esperanto. De 1960 li aktivis ankaŭ kiel komitatano de UEA. En 1966 li kunlanĉis kampanjon por kolekti monon por UEA per aĉeto de nomo de ĉambro en la Domo de UEA en Roterdamo: Ĉambro Aŭstralio. Jam delonge komisionano, li en 1974 fariĝis

komisionestro por Esperanto-ekzamenoj. En 1976 li ricevis la honorsignon de AEA pro elstara servado.

YVONNE RAYNER (1924-1985) forpasis la 26an de aprilo en Rockhampton North, Aŭstralio, kie ŝi estis vic- kaj fakdelegito.

MARIA J.A. van REES (1886-1985) forpasis la 8an de majo en Zeist, Nederlando. Ŝi lernis Esperanton en 1904, pro kio ŝi estis dojeno de Veterana Esperantista Klubo. Ĉar tiutempe ne troviĝis nederlanda instrudiplomo de Esperanto, ŝi vojaĝis al Britio por tion akiri. Kvankam poste blindiĝinta, ŝi daŭre restis aktiva en la movado.

WANDA SABELLI ASQUINI (1891-1985) mortis la 25an de marto en Bologna, Italio. Ŝi lernis Esperanton antaŭ 1911. Kiel loka aganto, ŝi gvidis kursojn kaj direktis ekzamenojn por la fervojista sekcio en Triesto kaj poste en Bologna por Itala Instituto de Esperanto. Oni nomis ŝin la lasta pioniro de la itala Esperanto-movado.

ANTON TOMIČ-MACH (1905-1985). Li naskiĝis en Glorenza, tiam en la aŭstra-hungara imperio. Lia feliĉa renkontiĝo kun Esperanto okazis en Zagrebo, kiam li estis 13-jara, en la biblioteko de sia patro Stanislav, kiu publikigis en 1910 *La vojo al vero* kaj *Du sudslavaj popolfabeloj*. De tiam li senlace laboris por Esperanto kaj en 1927, ĵus alveninta al Kolombio, gvidis la unuajn kursojn en la urbo Medellín, kie li forpasis la pasintan 1-an de aprilo. Li estis ankaŭ kunfondinto de Kolombia Esperanto-Ligo. Inter la spertoj, kiuj brulmarkis lian memoron estis la morto de Leo Tolstoj kaj la popolfestoj, per kiuj oni celebris la alvenon de la Haleja Kometo. Li estis bona amiko, poligloto kaj antaŭ ĉio humaneca.

Oficina Informilo

NOVA DUMVIVA MEMBRO

Sovetunio: O. Krasnikov.

DONACOJ 1985 (Gld).

ĝis la 14a de junio

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Belgio: G. Pirlot 32,82. Japanio: Skolta Esperanto-Ligo en Japanio 13,84; S-ino Kamati Humiko 13,84; Hosaka Hideo 41,52; Izumi Yukio 71,00; Yosimitu Kōiti 27,68. Nederlando: Sekcio Zeist de NEA 200,00. Svedio: J. Hammarberg 10,00. Anonima donaco 1 250,00. Diversaj malgrandaj 3,12. Sumo ĉi-jara 9 726,06.

FONDAĴO CANUTO: Anonima donaco 1 250,00. Sumo ĉi-jara 1 502,03.

FONDAĴO ANTONI GRABOWSKI (en usonaj dolaroj): FR Germanio: Helena Killmer 50. Hispanio: De la Puente 50; Juan Sole Pujol 50. Usono: Novjorka Laborgrupo 50. Sumo ĉi-jara us.\$ 3 000.

ĜENERALA KASO: Britio: S-ino D.E. Cross 10,56. FR Germanio: Anton Tanner 30,00. Japanio: Vidvino de d-ro Sinoda Hideo 2 259,57. Nederlando: J.A. Pinto de Souza 38,00. Diversaj malgrandaj 8,50. Sumo ĉi-jara 5 928,37.

JUBILEA JARO: Norvegio: S-ino E. Matland 38,80. Sumo ĉi-jara 1 690,58.

BUDAPEŝTA OFICEJO (TERMINOLOGIA SEKCIO): FR Germanio:

S-ino R. Paintner-Trumpp 448,00. Sumo ĉi-jara 1 860,72.

POR RENOVIGO DE LA DOMO: Japanio: Vidvino de d-ro Sinoda Hideo 10 000,00. Sumo ĉi-jara 32 145,04.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA



Tarifo: ĉiu vorto kostas 0,90 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton pro la ripeta aperigo de anoncetoj.

La Esperanto-grupo de Kronach (Bario, FR Germanio) serĉas du aŭ tri grupojn diverslandajn, kiuj kunagas lernante la lingvon, interŝanĝante spertojn kaj ideojn, eble ankaŭ vizitonte unu la aliajn. Skribu al: S-ro Armin Grötzner, Giessübel 36, D-8640 Kronach-Gehülz, FR Germanio.

Letervesperon kun ekspozicio pri Esperanto aranĝos komence de januaro diversaĝa, okdek-persona grupo de gekursanoj post sia duagrada lingvokurso. Bv. sendi bele afrankitajn leterojn, bildkartojn ks. al: PEA – Vojevodia Estraro, Skrytka 16, PL-50-952 Wrocław-17, Polando.

Revuoj kasete. Apartan dankon meritas pro volontula laboro en siaj liberaj horoj du teknikistoj, kiuj en hospitala studio de Groningen asistas la same dankindajn voĉlegantojn de nia revuo, la direktoro, kiu de 1983 disponigas la studion, kaj la blindulbiblioteko "Le Sage ten Broek" en Nimego, kiu kopias kaj dissendas nur kostopreze la kasetojn al ĉ. 60 abonantoj en ĉiuj mondopartoj. Ni dankas ankaŭ la voĉlegantojn kaj studianojn en Eindhoven, kiuj aktivas por sama nombro da legantoj de *Monato*. Jarabono por ambaŭ po 20 gld. ĉe la Kasisto de LIBE, Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk, Nederlando (poŝtgirkonto 5357176, aŭ po 27,50 gld. per RABObank Beverwijk, konto 1073-06336). Bv. informi blindulojn kaj aliajn handikapitojn pri tiu servo.

Ideala feriejo por esperantistoj estas Gastejo Edmond Privat de Kultura Centro Esperantista, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando.

Tiel varbas legantoj de MONATO por MONATO:

"La gazeto ne nur estas en si mem interesa, stimula kaj pedagogie valora; mi trovis ĝin la plej bona propagandilo, kiun mi havas. Tuj kiam homoj vidas, ke ekzistas serioza, inteligenta kaj dece prezentita gazeto pri aktualaj aferoj kaj kulturaj fenomenoj, tio ege altigas la prestiĝon de Esperanto."

Marjorie Boulton pri MONATO

Konvinkiĝu mem, petante provekzempleron ĉe la eldonejo:
MONATO, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio, kontraŭ du internaciaj respondkuponoj (sed vi povas fari tiun peton nur unufoje!).



La historio absolvos min

La unua Esperanta libro el Kubo. Ĉefverko pri kuba historio. Fama parolado, farita en la proceso Moncada kaj fariĝinta programo de la kuba revolucio.

El la hispana tradukis Kuba Esperanto-Asocio. Havano: Eldonejo José Martí, 1984. 62p. 21cm. Prezo: 4,20 gld. ĉe la Libroservo de UEA. Triona rabato por samtempa mendo de 3 ekzempleroj.

URĜA ALVOKO: La sola espero rilate la solvon de la mondvastaj problemoj estas la reveno al la bibliaj instruoj. Por ricevi senpagan libreton kun fascinaj detaloj, skribu tuj al: **Internacia Biblio-Misio, 29 Plantation Road, Poole, Britujo BH 17 7LN** aŭ, se ekster Eŭropo al: **P.O. Box 373, Baronia, 3155 Vic., Aŭstralio.**



Koresponda
Servo
Mondskala
de UEA

Petu la novan informilon de: KSM, p/a R. Llorens, 121 bis, BD. Napoléon III, F-06200 Nice, Francio.

RADIOTEKNIKA ARTIKOLARO

- ★ 23 altnivelaj fakaj artikoloj pri tre diversaj radio-teknikaj temoj
- ★ abunde ilustrita per fakaj figuroj kaj grafikaĵoj
- ★ kun terminareto kaj listo de eldonaĵoj
- ★ 64 paĝoj, plus 20 paĝoj da fakaj anoncoj

Redaktis László Szilvási. Eldonis Scienca Eldona Centro de UEA, Budapeŝto, 1984. 24cm. ISBN 963 571 166 6. Prezo: 7,50 gld. plus sendokostoj. Mendu ĉe Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Emistudio estas kanada Esperanto-kooperativo kies kunlaborantoj estas membroj de la familio du Temple

EMISTUDIO

Nova Produkto: Emistudio anoncas la **UNUAN KASETON DE VESELIN DAMJANOV:**
TITOLO: VESELIN DAMJANOV KONCERTAS EN KANADO.

La kaseto prezentas operajn ariojn, popolkantojn, kaj kanzonojn ne troveblajn ĉe diskoj. Profesie registrita en teknike plej moderna studio kun kolora bildo de la kantisto, la kaseto havas falditan enfermaĵon kun tekstoj de la Esperantaj kantoj. La kaseto estas unika donaco por neesperantistoj, ĉar ĝi prezentas kantojn ankaŭ en la lingvoj franca, itala, rusa, angla kaj bulgara. Eminentia donaco por amiko, ĝuinda kaj melodia aŭskultado por vi de la plej fama kaj riĉa baritona voĉo en Esperantujo. Subtila pruvo al la ĝenerala publiko pri la beleco de Esperanto. Mendu ĉe Emistudio por \$11,00 kan., aŭ ĉe UEA por 31,80 gld.



BUKEDO DE LA MONATO. Ĉiumonate EMISTUDIO donas premion al bona esperantisto. Gesamideanoj bonvolu sendi al Emistudio nomon de inda esperantisto kun klarigo kial tiu indas ricevi kaj premion kaj "bukedon". Tiu kun la plej granda kvanto de proponintoj gajnos. La premio estas la varo supre reklamita.

ROZBUKEDON KAJ PREMION GAJNAS ĈI-MONATE

VUK ECHTNER EL ĈEĤOSLOVAKIO

EMISTUDIO 765 Braemar Avenue, Sidney, BC V8L 3S1, Kanado.

Libroj de TK/Stafeto

	gld.
<i>Ĉu li bremsis sufiĉe?</i> Johán Valano	12,00
<i>Ĉu li venis trakosme?</i> Johán Valano	18,00
<i>Ĉu ni kunvenis vane?</i> Johán Valano	21,00
<i>Ĉu ŝi mortu tra-fike?</i> Johán Balano	15,00
<i>Du el</i> M. Boulton/P. Thorsen	33,00
<i>Esperanto aŭtodidakte</i> Audrey Childs-Mee	24,00
<i>Fabeloj de la verda pigo</i> Louis Beaucaire	18,00
<i>Hieraŭ – hodiaŭ – morgaŭ</i> Bernard Golden	12,00
<i>Hieroglifo</i> Julia Pióro	9,60
<i>Je la flanko de la profeto</i> Italo Chiussi	30,00
<i>Kaj la ceter' nur literaturo</i> Gaston Waringhien ..	36,00
<i>Kara diablino</i> Douglas Boatman	9,00
<i>Kaverno apud la maro</i> Bertram Potts	27,00
<i>Kumeŭaŭa</i> Tibor Sekelj	9,00
<i>Lidja Zamenhof</i> Isaj Dratwer	9,00
<i>Misio sen alveno</i> John Francis	21,00
<i>Primico</i> Robindronath Tagor	9,00
<i>Trofeoj</i> Maria de Heredia	9,00
<i>La vuala de l' tempo</i> J.H. Sullivan	19,50


La Libroservo de UEA donas **rabaton de unu triono** (plus sendokostoj de 10%, kun minimumo de 5,00 gld.) por samtempa aĉeto de minimume tri ekzempleroj de samtitola libro, sendotaj al la sama adreso.

Mendu ĉe la Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Prestiga volumego

ESPERANTA ANTOLOGIO

Poemoj 1887-1981



“La unua eldono estis jam impona libro per sia dikeco, presperfekteco kaj interna riĉeco – la nuna estas ankoraŭ pli impona pro la samaj kvalitoj: 888 paĝoj kun 706 poemoj de 163 aŭtoroj (inter ili 24 virinoj) el 35 landoj..., kaj ĝi inde ricevis la numeron unuan en tiu Jubilea Kolekto, per kiu UEA decidis konsekri la Jarcenton de Esperanto.”

Gaston Waringhien

Redaktis William Auld, kun ampleksa postparolo kaj 36 paĝoj da bibliografiaj notoj.

Rotterdam: UEA, 1984. 12+871p. 22cm. Bindita. Jubilea Kolekto *Jarcento de Esperanto*, n-ro 1. ISBN 92 9017 030 1. Prezo: 60,00 gld. plus sendokostoj. Mendu ĉe la Libroservo de UEA!

Festlibro de Akademio de Esperanto omaĝe al Prof. Gaston Waringhien

LIKAJNI

Pompa volumo kun kontribuoj de

- * 49 eminentuloj sur diversaj kampoj
- * Originalaj literaturkritikaj, esperantologiaj kaj interlingvistikaj artikoloj, traktaĵoj kaj aliaj
- * Bibliografio de la verkaro de Gaston Waringhien
- * Biografioj pri Gaston Waringhien kaj la kontribuoj
- * Faksimiloj de korespondaĵoj de L.L. Zamenhof

Redaktis Reinhard Haupenthal (1945). Antverpeno/La Laguna: TK/Stafeto, 1985. 520p. Ilus. 22cm. ISBN 90 6336 034 7.

Prezo: 66,00 gld. Rabato de unu triono por samtempa aĉeto de minimume tri ekzempleroj. Mendu de la Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.



LIKAJNI
Festlibro de Akademio de Esperanto
omaĝe al profesoro Gaston Waringhien